

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

103-a jaro • n-ro 1236 (5) • Majo 2010

Kio nova en Grezijono?



Neŭtraleco **Kongresa** **La pola** **La fina venko**
en praktiko **komuniko 3** **katastrofo** **jam okazis**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
☎ +31-10-436-1044,
✉ uea@co.uea.org
TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 99 ... Malferme: Neŭtraleco en praktiko: ne juĝi sed eduki (Osmo Buller)
100 ... Kongresa Komunikado 3. 95-a Universala Kongreso de Esperanto
101 ... Pola katastrofo tuŝis esperantistojn (Osmo Buller);
Malferma tago spite la cindran nubon (Osmo Buller)
102 ... "Gepatrolando estas homaro" (José Antonio Vergara)
103 ... Kongresa temo: Interproksimigo de kulturoj (Miyamoto Masao);
Niaj interretaj radiopaĝoj
104 ... Kio nova en Grezijono? (François Lo Jacomo)
105 ... Printempa Esperanta sumoo (Hori Yasuo)
106 ... Forumo: La fina venko jam okazis (Nyegosh Dube)
107 ... Ju pli oriente, des pli bone (Renato Corsetti)
108 ... Itala Esperanto-Federacio 100-jara, sed tute juna
kaj preta por la dua jarcento (Renato Corsetti)
109 ... Recenzoj: Carlo Minnaja pri *Homarano. La vivo, verkoj*
kaj *ideoj de d-ro L.L. Zamenhof*
110 ... Angela Tellier pri *Ĉio fareblas kaj Ĉu mi malplaĉas al vi?*
111 ... Detlev Blanke pri *Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini*
al la nuna tempo
112 ... Heidi Goes pri *Esperanto kaj mi – eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj*
landoj – Memorajo de la 94-a japana Esperanto-Kongreso, oktobro 2007
kaj *Raportoj pri la Invitprojekto – 20 invititoj el Azio al la UK*
en Jokohamo
113 ... Laste aperis
114 ... La naŭa (Rob Moerbeek)
115 ... Oficiala informilo; Ni savu la dronantan ŝipon (Arlain Kizeyidioko)
116 ... Tri intervjuoj kaj dulingva koncerto en Taĝikio (Ruŝno Rajhoni);
Postnikov kaj Zamenhof en Bosnio kaj Hercegovino (Miĉo Vrhovac)
117 ... Esperanto bonvena (Alberto Flores)
118 ... Printempa renkontiĝo (Milĉo Beloreŝki)
119 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: En la okcidenta Francio ekzistas Esperantista Kulturdomo, kiun en 1951 aĉetis francaj Esperanto-instruistoj. Pri novaĵoj en la kastelo Grezijono legu sur la p. 104.

Foto: François Lo Jacomo

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T.
Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79
21 [h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino

Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,
NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori
Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27,
JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken,
Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José
Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto
Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h],
+56 65 326031 [of], ✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO:

S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI:

S-ro Stefan MacGill.

Neŭtraleco en praktiko: ne juĝi sed eduki

Neŭtraleco estas baza principo de UEA, sed facila arto ĝi ne ĉiam estas. Ne ekzistas formulo por kalkuli neŭtralecon, sed la decidantoj devas mem pritaksi tion. Kiam ili agas nome de UEA, ili devas scii ne miksi en sian rezonadon proprajn politikajn, religiajn aŭ aliajn preferojn. Necesas konsideri nur la intereson de UEA, sen timi eĉ malagrablan kritikon de tiuj, kiuj respondecas nur al si mem.



Neŭtraleco de UEA estas difinita en art. 5 de la Statuto: *UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.*

Elektio de kongreslando kaŭzas diskutojn pri neŭtraleco. Oni diras, ke elektante iun landon, UEA iel apogas ĝian reĝimon, kio ne estas neŭtrala. Oni ankaŭ diras, ke post la Malvarma Milito neŭtraleco arkaikiĝis aŭ devus esti rekonceptita, tiel ke ankaŭ pri ŝtataj reĝimoj UEA povu sin esprimi. Estas bone, ke okazas tiaj diskutoj, ĉar niaj decidantoj povas erari. La diskutoj ankaŭ montras la gravecon de UEA por esperantistoj. Pri UEA oni ne indiferentas.

Al niaj decidantoj la afero estas klara: dum validas la supra vortumo de art. 5 de la Statuto, ili ne esprimu opinion pri la reĝimo de la kongreslando. La unua kondiĉo, por ke lando povu inviti UK, estas ekzisto de Esperanto-asocio. En la praktiko taŭgas nur lando, kies asocio aliĝis al UEA kaj havas la forton por organizi UK. Kvankam UEA ne juĝas pri la politiko de la kandidata lando, UK ne nepre eblas ĉie. Nome, ne sufiĉas loka forto kaj fizikaj kondiĉoj, sed UEA devas povi libere kunmeti la kongresan programon. Ankaŭ fakaj asocioj k.a. movadaj instancoj, kiuj kunlaboras kun UEA, devas povi okazigi en UK siajn proprajn aranĝojn. Feliĉe en la kazo de tiuj UK-oj, kies lok-elekton

mi partoprenis, neniam iu lando estis rifuzita pro tio, ke iu politika aŭ religia asocio aŭ ekzemple samseksemuloj ne rajtus tie kunsidi.

La aperon de politikistoj en la Honora Komitato aŭ kiel Alta Protektanto de UK oni foje kritikas kiel lezon de neŭtraleco. Ĉe UK ili tamen rolas kiel reprezentantoj de sia lando, ne kiel politikuloj. Oni ne havas ĉie tradicion de tiaj honoraj funkcioj, sed en multaj landoj ĝi ja ekzistas, ĉu nur kiel dekoracio ĉu kun reala signifo por montri la gravecon de la aranĝo aŭ por pliglatigi aliron al oficialaj instancoj kun petoj pri financa aŭ alia subteno. Konsulejo povas rigardi vizopeton

de kongresano pli favore, vidante la rangon de la Alta Protektanto. Altranguloj ja "pruntedonas" sian nomon ofte nur por akceli turismon kaj ili patronas aranĝojn, kies celoj estas kontraŭdiraj inter si. Tial UEA ne prezentas tiajn amikojn de UK kiel subtenantojn de Esperanto, krom se ili mem tiel esprimiĝis. Kontaktoj kun ili tamen donas okazon informi ilin pri Esperanto. Ĉiujare kelkaj el ili ankaŭ vizitas la inaŭguron kaj estas impresitaj. Kelkaj fariĝas veraj amikoj kaj foje eĉ embarasas nin per sia entuziasmo.

Kio pri homaj rajtoj? Ĉu UEA estas homrajta organizaĵo, kiu prijuĝu landojn ankaŭ el tiu vidpunkto? Pensante pri tio mi memoras la vortojn de prezidento U. Kekkonen en *La finna vojo* (1989) pri la neŭtrala Finnlando en la mondo: anstataŭ juĝisto ĝi preferas esti kuracisto. Estas interese, ke kiel Ivo Lapenna en UEA, ankaŭ Kekkonen parolis pri aktiva neŭtraleco. Laŭ la Statuto respekto de homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por la laboro de UEA. Homrajta edukado siavice estas esenca parto de tiu laboro, kaj la rolo de UEA pli trafe karakterizeblas kiel tiu de edukisto. Por tiu edukado UEA dediĉis ekz. programerojn en UK-oj kaj eldonis la bonegajn librojn *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*, *Kio estas demokratio?* kaj *Paĉjo, kio estas rasismo?* UEA edukas pri homaj rajtoj, sed ĝi ne juĝas – krom se temas pri lingvaj homaj rajtoj, specialaĵo de UEA, kiu ja kongruas kun ĝia Statuto, eĉ se ĝi ne konas tiun koncepton. Tamen, ankaŭ pri lingvaj homaj rajtoj UEA pli eduku ol verdiskuti.

Mi kredas, ke neŭtraleco plu restos bona principo, kiu certigos, ke plejparto de la esperantistoj povos identiĝi kun UEA.

Osmo Buller



Kongresa komunikado 3

95-a Universala Kongreso de Esperanto Havano, Kubo, 17 – 24 julio 2010

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.

Retadreso: kongresoj@co.uea.org.

TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html

Loĝado

Hotelo Palco estas plena kaj la hoteloj St. Johns, Nacional kaj Tryp Habana Libre estas nuligitaj. La 19-an de aprilo ne plu estis lokoj en 2-litaj ĉambroj en hotelo Club Acuario, kie okazos la Infana Kongreseto.

Ekskursoj

La ekskursoj A2, P1, P3 kaj E2 (en merkredo) estas plenaj.

La ekskurso P2 estas nuligita.

Antaŭ ol vojaĝi


Estas konsilinde kunporti kontantan monon (eŭrojn aŭ alian valuton), ĉar monŝanĝo per kreditkarto aŭ bankokarto estas ege multekosta (krom kurza malgajno estas ankaŭ 11%-a maklerajo).

Oni kunportu sunŝirmilojn kaj sunkremon, ĉar ili ne estas facile troveblaj surloke.

Ne estas permesite porti en la landon neprilaboritajn manĝaĵojn, sed ili estos konfiskitaj en la flughaveno.

Konfirmilo nepre necesa

Oni nepre kunportu la bluan kongresan konfirmilon! Sen ĝi oni ne rajtos tuj eniri la kongresejon, sed pro sekurecaj kialoj oni devos iri – sub la varmega suno! – al oficejo je kelkdekmetra distanco por ricevi nomŝildon.



Transporto

Por tiuj kongresanoj, kiuj mendis hotelon pere de UEA, estos transporto de la flughaveno al la hoteloj ĉe la alveno kaj reen al la flughaveno post la fino de la UK. Oni bv. nepre sciigi UEA pri la dato, horo kaj numero de sia alvenflugo!

Same por tiuj, kiuj mendis hotelon pere de UEA, estos transporto inter la hoteloj kaj la kongresejo, dum aliaj devos mem aranĝi la transporton.

Flughavena imposto

Je la foriro el Kubo oni devos pagi en la flughaveno CUC 25,00 por la flughavena imposto.

Internacia Kongresa Universitato

Prof. d-ro Humphrey Tonkin gvidos la 63-an sesion de IKU kiel ĝia rektoro.

Aliĝilo

Aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe la Centra Oficejo. Eblas ankaŭ elŝuti ĝin en PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo. Ĉar la UK estos jam tre baldaŭ, estas plej konsilinde aliĝi rekte ĉe UEA per la reta aliĝilo ĉe http://www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php.

Kotizoj

Ekde la 1-a de aprilo la kotizoj estas (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj (IM) de UEA (ne MG) € 240,00 (180,00); MG-membro aŭ ne-IM de UEA € 300,00 (225,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, € 120,00 (90,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, € 180,00 (135,00). Por la Latina Ameriko: IM-UEA (ne MG) € 120,00; MG aŭ ne-IM de UEA € 150; Komitatano, kunulo... IM de UEA € 60,00; Kunulo, junulo... ne-IM de UEA € 90,00. Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post 1989-12-31 senpage (bv. sendi kopion de dokumento). Pri pagmanieroj vd. Jarlibron 2009 (p.38-39) aŭ www.uea.org/kongresoj/uk_pagmanieroj.html.

Statistiko

Ĝis la 19-a de aprilo estis registritaj 838 kongresanoj el 59 landoj. Sur la unua loko estis Kubo kun 120 aliĝoj, sekvate de Francio kun 109 aliĝoj. 15 aŭ pliaj aliĝoj venis el Japanio (70), Germanio (64), Brazilo (60), Italio (43), Nederlando (31), Belgio (24), Pollando (21), Meksiko (19), Britio kaj Kanado (po 17), kaj Danio, Kroatio kaj Litovio (po 15).

Malferma tago spite la cindran nubon

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo sabaton, la 17-an de aprilo.

Multaj estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de la haltigo de aertrafiko pro la cindra nuboj elsputita de islanda vulkano.

La ĉefgasto estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri edukado, kiu dufoje prelegis pri Esperanto kaj la monda

eduka problemo (la prelego aperos en la junia numero).

Nora Caragea legis el *Pacrakontoj*, la kvara libro de la germana aŭtorino Gudrun Pausewang en ŝia traduko.

Rob Keetlaer prezentis sian retejon pri proverboj, www.proverbaro.net.

Sian agadon prezentis ankaŭ TEJO kaj Esperanto@Interreto (E@I), dum komitatano Johan Derks diskutigis interesitojn pri la utilo de reta decidfarado. Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj.

La Libroservo vendis sume por € 2107,52. La ĉefa furoraĵo (8 ekz.) estis la nova *English-Esperanto-English Dictionary* de John Wells. De *Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj* kaj la Tonkin-festlibro *La arto labori kune* estis venditaj po 6 ekz.

Osmo Buller



Fotoj: Paulo Branco

Pola katastrofo tuŝis esperantistojn

La aviadila katastrofo apud la rusa urbo Smolensk la 10-an de aprilo, en kiu pereis la pola prezidento Lech Kaczyński kun sia edzino kaj 94 aliaj eminentaj poloj, skuis ankaŭ esperantistojn. Tion montris multnombraj kondolencoj aperintaj en diversaj retaj forumoj kaj senditaj rekte al geamikoj en Pollando.

Jen la kondolenca mesaĝo de UEA:

Nome de Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas Polan Esperanto-Asocion, la polajn membrojn de UEA kaj ĉiujn polajn esperantistojn pro la tragedia pereo de la Prezidento de la Pola Respubliko s-ro Lech Kaczyński, lia edzino kaj multaj elstaraj reprezentantoj de la pola publika vivo en aviadila akcidento. Esperantistojn tiu ŝoka informo tuŝas aparte pro la historiaj ligoj de la Internacia Lingvo kun Pollando, kies ĉefurbo estas la naskiĝurbo de Esperanto. La varmaj sentoj de esperantistoj pri Pollando montriĝis kaj pli firmiĝis pasintjare lige kun la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjelastoko, per kiu la Esperanto-movado omaĝis la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof en tiu urbo. Niaj pensoj estas denove en Pollando, ĉi-foje plenaj de funebro kaj kunsento kun la proksimuloj de la forpasintoj.

Osmo Buller

Ĝenerala Direktoro de UEA

Osmo Buller sendis kondolencojn de UEA ankaŭ al la ambasadoro de Pollando en Nederlando.

Unu el la viktimoj de la akcidento estis Jerzy Szmajdziński, vicprezidanto de la Pola Sejmo, kiu komence de marto akceptis esperantistan delegacion en la parlamentejo. Pri tiu renkontiĝo nia revuo raportis en la marta numero (p. 2). S-ro Szmajdziński forpasis nur unu tagon post sia 58-a datreveno.



Lech Kaczyński



Jerzy Szmajdziński

"Gepatrolando estas homaro" (José Martí)

Pro la hazardo ani ĉi-periodo la UEA-estaron, jam en du sinsekvaj jaroj mi devis kungvidi tiun longan, iomete kaosan programeron dum kiu la landaj reprezentantoj laŭvice salutas surpodie la ĉeestantojn de la solena UK-malfermo.

Por vigligi ĝin, la unuan fojon (Roterdamo, 2008) mi improvize kaptis la okazon peti ĉiun el ili saluti per la propra lingvo, laŭ la proprakultura maniero sin adresi en similaj situacioj al publiko kiu fakte estas kunveninta amikaro. Ne ĉiuj komprenis la ludon kaj insiste salutis E-lingve (estas ni esperantistoj, dirus Baghy...), iuj opiniis la iniciaton tikla, sed aliaj ŝatis kaj ĝuis tiun efemeran ŝancon sperti kaj pruvi al la invititaj gravuloj ke ĉe ni eblas aŭskulti la buntan voĉon de la homaro, ke ni sincere (ne nur laŭbuŝe pro oportunismo aŭ "politika ĝusteco") aprezas la kernan valoron de la lingva diverseco, ke nia daŭra strebado al justa kaj racia lingva ordo estas profunde ligita al konvinkita pledado por la lingva dimensio de la homaj rajtoj.

Pasintjare, per artikolo en ĉi tiu revuo (aprila n-ro, p. 90) mi invitis la homojn denove saluti per siaj unuopaj etnolingvoj sed laŭ la jida esprimo kiun Zamenhof sendube uzis ĉiutage (šolem alejhem, t.e. pacon sur vin), kiu fakte estas interhoma saluto tradicie uzata en vasta areo de Okcidenta Azio, Norda Afriko kaj Orienta Eŭropo, komuna do al tieaj judoj, islamanoj, kristanoj k.a. Ja ni tiam festis lian noblan memoron ĝuste en lia naskiĝurbo, kie li elpensis sian grandiozan, pacaman ideon. La afero bone funkciis, kaj ekz. estis bele simbola fakto ke la israela salutantino uzis kaj la hebrean kaj la araban lingvojn, kaj juna novzelandano regalis nin per tiu paca deziro tradukita en la lingvon de sialandaj indiĝenoj, la maoria popolo.

Mi nun proponas ke la lando-reprezentantaro denove vibre plenigu la UK-salonon per la sonoj de kiel eble plej multaj lingvoj de la mondo, elstarigante ĉi-foje nian fortan senton de aparteno al komuna homaro, laŭ la humanismo de homoj tiaj, kia la kuba poeto, filozofo kaj ĵurnalisto José Martí (1853-1895). Tiu historia kaj intelekta heroo de la ĉi-jara kongreslando, cetere verkisto vaste konata tra la tuta hispanlingvujo, skribis la jenon kvar monatojn antaŭ sia morto jen la frua aĝo de 42 jaroj: "Gepatrolando estas homaro, ĝi estas tiu ero el la homaro kiun ni rimarkas plej proksime kaj ene de kiu ni naskiĝis (...) la homo ne rezignu plenumi sian devon al la homaro, ĉe tiu ero el ĝi kiun li/ŝi havas plej proksime".



Verŝajne en la diversaj kulturoj estis/estas gravaj pensuloj, moralaj gvidantoj aŭ ideokreantoj kiuj lanĉis simile universalismajn kaj humanismajn atentigojn, kiuj iel apartenas al la komuna heredaĵo de ni kiel postsekvantoj de la sindona humanisto D-ro Esperanto. Mi kredas ke alporti tiujn rimarkojn (kaj informojn pri la koncernaj lanĉintoj kaj kulturaj kuntekstoj) estus interesa kontribuo al la kongresa temo (Interproksimigo de kulturoj).


Bela alternativo estus traduki plurlingve tiun inspiran alvokon de Martí, sentema intelektulo, kiu i.a. instruis la hispanan en Novjorko, scipovis plurajn fremdajn

lingvojn kaj substrekis la utilon de ilia studado por koni alilandajn kulturojn kaj plibonigi la scion pri la gepatra lingvo. Omaĝi lian homecan sintenon, fakte proksiman al tiu de la kreinto de Esperanto feliĉe ne estos politike malneŭtrala misago, ĉar liaj verkaro kaj idearo sendistinge apartenas al ĉiuj kubanoj, al ĉiuj amerikanoj, al ĉiuj homoj.

Kial fari tion? Nu, mi firme kredas ke ni devas pli klare emfazi, ekz. dum tiu solena momento de la ĉiujara UK, nian subtenon al lingva diverseco. Eĉ pli, mi daŭre revas ke ni sukcesos establi Lingvan Festivalon kiel konstantan programeron de nia migranta UK. Ĝi estos grava kultura donaco al la popoloj en kies urboj ni, samtempe unulingva kaj bunte plurlingva nomadaro, starigos nian unusemajnan jarkampadejon. Mi certas ke, kiel jam spertite de pluraj generacioj, ĉe la lingvemuloj ni varbos homojn kiuj komprenos la senprecedencan valoron de Esperanto, kiel ekz. jam nun okazas en Mulhouse, en la tiea Fakultato de Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj. Tial mi forte subtenis la okazigon de la UK 2012 en Hanojo, i.a. ĉar ĝi okazos ĝuste en la tiea Fremdlingva Fakultato. Fakte mi opinias tiajn intelektajn mediojn multe pli taŭgaj por nia UK ol la kutimaj luksaj hoteloj.

Mi kredas ke por ni esperantistoj (samtempe loka kaj tutmonde orientitaj) tiu ideo ke "gepatrolando estas homaro" tute ne estas fremda, sed male ĝi estas konstato kaj sinteno grava por probable ĉiu el ni. En Havano (kaj tra la mondo, per la reto) ni igu ĝin plurlingve vivanta.

José Antonio Vergara



Kongresa temo: Interproksimigo de kulturoj

Antaŭ 40 jaroj, en marto 1970, nia revuo aperigis la ĉi-suban artikolon de Miyamoto Masao, kun la titolo "Reciprokigi la kulturon". Ĉar ĝi ne perdis sian aktualecon, male, parolas pri la ĉi-jara kongresa temo, ni reaperigas ĝin.

Al eŭropanoj kaj amerikanoj mankas vera scio pri la kulturo kaj pensmaniero de la Oriento. Siaflanke, la Oriento multe pli bone konas la kulturon de la Okcidento. Sur tiu malekvilibro baziĝas la konata projekto "Oriento-Okcidento" de Unesko. Ĉu inter tiuj, kiuj scipovas Esperanton, la afero statas pli bone? La aŭtoro avertas nin, ke ne.

Ĉu nia lingvo iam povos konkeri la mondon, tiel ke ĝi fariĝos vere internacia lingvo cirkulanta ne nur en Eŭropo sed ankaŭ vaste en Azio kaj Afriko? Certe jes, mi ne volas nei, same kiel vi ĉiuj. Sed tamen la nuna stato ne permesas al ni tiel facile kredi, mi pensas. Jes, almenaŭ ĝia strukturo restos tute sama aŭ preskaŭ sama, eĉ kiam la lingvo fariĝos en vera senco internacia. Mi havas nenian dubon pri tio.

Oni ĉiam parolas pri ĝia internacieco, kaj niaj organizaĵoj klopodas por tio kompreneble, sed tamen la realo...

La lingvo sen akompano de kulturo kompreneble ne povas ekzisti, eĉ kiel ajn malalta nivelo katenas la lingvon. Nia lingvo, pretendante internaciecon, devas teni same la altan nivelon internacian. Por tio, antaŭ ĉio ni bezonas studi alilingvajn kulturojn kaj internaciigi nin mem. La stato tamen, laŭ mia opinio, restas tute alia.

Niaj eŭropaj kolegoj ĉiam parolas kaj restas kontentaj pri sia internacieco. Mi tamen starigas la demandon: Ĉu niaj eŭropanoj iam sincere studis aŭ volas studi orientan kulturon? Aŭ ili iam klopodis por tio? Mi bedaŭre devas respondi: ne! Kompreneble ekzistas multaj, multegaj esceptoj por tio, do mia aserto estas iom troa aŭ sarkasma. Sed tamen...

Mi iam demandis s-ron C.C. Goldsmith, kiu vizitis nin antaŭ jaroj: Ĉu vi, angloj, iam legis Genzi-monogataro, kies angla traduko jam troveblas? Bedaŭrinde lia respondo estis nea. Ne temas pri unusola verko, eĉ se kiel ajn mondfama, sed mi volas aludi per tio, ke eŭropaj esperantistoj restas tute analfabetaj pri la azia kulturo.

Jen vidu nin japanojn! En nia lando preskaŭ ĉiuj – se temas pri tiuj, kiuj ricevis edukon pli altan ol en mezlernejo – almenaŭ unu fojon konatiĝas kun Shakespeare, eĉ se per traduko aŭ dramo aŭ kino. Tolstoj, Ibsen... Sartre, Camus kaj tiel plu ne estas ekster nia intereso. Oni ĉiutage ŝutas per

tradukoj el eŭropa literaturo, la amerika ankaŭ ne postrestas, lastatempe ankaŭ la afrika sekvas iom post iom.

Mi precizigis mian demandon al s-ro Goldsmith: Ĉu tia stato validas nur por la angloj aŭ ne? Lia respondo kompreneble estis hezita kaj li devis konstati, ke la eŭropanoj, eĉ se intelektaj, multe postrestas la japanojn tiurilate.


Kaj kio kun niaj esperantistoj? La stato ŝajne ne estas pli bona ol ĉe ordinara eŭropanoj. Mi povas konkludi tion el multaj esperantaĵoj.

Ĉu nia lingvo povos triumfi per la nuna stato? Tute ne. Unue eŭropaj kaj amerikaj esperantistoj devas esti pli modestaj kaj studi pri Azio kaj Afriko. Ili ne katenu nian lingvon en la kadro de Eŭropo kaj Amerikoj! Mi petas ne facile tuj konsenti al mia postulo, sed komenci sincere studi tieajn kulturojn kaj peni iel kunfluigi aŭ reciprokigi la fruktojn. Sen tio nia lingvo ne povas fariĝi tutmonda. Esperanto, kiu origine estis kreskigita el la trunko de la eŭropa kulturo, nepre devas sorbi al si alikontinentajn fruktojn, sen kio la vera internacieco ne povas ekzisti.

La plej urĝa afero por nia movado ne estas babili pri bagatelaj lingvaĵoj, kiel ofte montras la Esperantaj gazetoj, sed turni nin al ĉiam nova tasko: reciprokigi la kulturon. Ni japanoj mem komencos turni niajn okulojn ne al Eŭropo sed al Azio kaj Afriko.

Nur per tiaj klopodoj niaj organizaĵoj fariĝos internaciaj, sed ne intereŭropanaj, garnitaj per 'aziaĵoj', pli vere 'japanaĵoj', kies portanto restas nur unu el la aziaj landoj.

Niaj interretaj radiopaĝoj



Interretajn (podkastajn) radioelsendojn en Esperanto oni povas trovi sur la jenaj retpaĝoj:



<http://esperanto.cri.cn>

www.polskieradio.pl/eo/

www.radio-vatikana-esperanto.org/

www.ameriko.org

www.3zzz.com.au/staging/programs.aspx

www.viavento.republika.pl/aktuale/sonmaterialoj.htm

<http://la-ondo.rpod.ru>

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy/category/podkasto>

<http://parolumondo.com/>

<http://radioverda.com/>



**Lastatempe ampleksiĝas
la debato pri la kastelo
Grezijono, Esperantista
Kulturdomo en la okcidenta
Francio. Aĉetita de francaj
Esperanto-instruistoj en
1951, ĝi travivis prosperan
periodon, kaj akceptis foje
pli ol 140 gastojn samtempe.**

Unuan krizon ĝi spertis en 1998, kiam kontrolkomisiono deklaris, ke ĝi ne plu kongruas kun la aktualaj sekurecaj normoj. Tio vekis tujan reagon de multaj esperantistoj, kiuj nepre volis konservi tiun ĉi historian heredaĵon de Esperanto-kulturo. Dank' al vigla laboro de skipo de volontuloj, ĝi sukcese travivis tiun ĉi malfacilan momenton. Ĝi eĉ modernigis sian kuirejon tiel ke, ekde 2009, ne plu estas devigo aĉeti manĝojn preparitajn ekster la kastelo: eblas kuiri mem, kio rezultigas konsiderindan ŝparon, kondiĉe ke troviĝas volontuloj por tion fari senpage.

Tamen dua bato trafis la kastelon en 2009. Malbona kunlaboro iel paralizis la komitaton ĝis paradoksa rezulto, ke subvencion ricevotan por muzika infanrenkontiĝo decidis rifuzi plimulto de la Grezijonaj komitatanoj. La aranĝo tamen okazis ekster Grezijono: la landa asocio UFE sukcesis kapti la koncernan subvencion, sed tio kaŭzis konfuzan situacion kun pluraj demisioj.

Refoje, tiu ĉi problemo vekis fortan reagon. Sed aparte interese estas, ke en la



Kio nova en Grezijono?

mateno antaŭ la jarkunsido, la 16-an de majo 2009, okazis diskuto malferma al ĉiuj dezirantoj, en kiu esprimiĝis forta deziro solvi la problemon kaj nepre konservi kaj plu vivteni la kastelon. Esperanto ja havas sian kulturon, kaj tia kastelo en mondfama turisma regiono "Kasteloj ĉe Luaro" estas grava elemento de tiu ĉi kulturo. Mi mem konatiĝis kun ĝi kiel 16-jarulo, kaj dum jaroj ĝi aspektis al mi la grandioza centro de Esperanto.

Plurajn demandojn ja necesos solvi. Unue, evidente, elekti komitatanojn kapablajn kune labori. Tiucela jarkunsido okazos la 29-an de majo. Samtempe ni konstatis, ke laŭ nova leĝo, la societo devus aperi en la Komerca Registro jam de 2002, kaj la koncernan formalajon oni sistempe neglektis. Tiu ĉi forgeso estas nun riparata.

Due, necesas bone antaŭplani konstrulaborojn por la venontaj jaroj. Volontuloj faris multan laboron de deko da jaroj, senpage kaj laŭ siaj kapabloj, sed ĉu tio sufiĉos estontece? La 18-an kaj 19-an de marto ekspertizistoj vizitis la konstruaĵon kaj konkludis, ke ĝi estas en sufiĉe bona stato – cetere la oficialaj komisionoj kontrolas ĝin regule – sed, por loĝebliglo ankaŭ vintre, necesas aldoni hejtilojn, pliaj duŝoj bonvenas (ankaŭ interne de almenaŭ kelkaj ĉambroj mem), la aktualaj sekurecaj normoj devigas krei novajn ŝtuparojn por rajti dormi ankaŭ en la dua etaĝo de la kastelo... – tiaj plibonigoj postulos plurajn jarojn kaj devos esti farataj grandparte de profesiuloj.

Kaj jen tria fundamenta demando: ĉu esperantistoj venos sufiĉe nombraj por funkciigi tian kastelon? Ne sufiĉas kelkaj semajnoj de someraj staĝoj por garantii financon ekvilibron, kaj kiel eble plej rapide ni devas esperi malfermi ĝin pli ol dek (se eble dudek) semajnojn en la jaro. Tio postulas grandan homan energion, kaj interese estas, ke francaj Esperanto-asocioj UFE kaj SAT-Amikaro proponis engaĝi sin en la administrado mem de Grezijono: okazis ekzemple debato pri "Rilatado kun kulturcentroj en Franclingvio" (nome: Grezijono kaj Kvinpetalo) dum la ĵusa kongreso de SAT-Amikaro, la 4-an de aprilo 2010 en Bretonio. Sed ankaŭ necesos akcepti ne nur Esperanto-staĝojn: jam de tri jaroj la ne-esperantista matematika asocio Animath, kies kasisto mi estas, organizas en Grezijono staĝojn financatajn de la Ministerio pri Edukado por pli ol 40 lernantoj (13- ĝis 17-jaraj)



Ekspertiza laborkunsido, pristudo de dokumentoj kaj mapoj en la biblioteko. De maldekstre: Claude Bensimon, Jacqueline Maussion, sekretario de la kulturdomo, Jean-Jacques Maussion, ŝia edzo, ankaŭ konstru-profesiulo, Claudé Trésorier, Francis Lasso kaj Frédéric Lauriol, elektrikisto kiu jam planis elektran hejtadon de la kastelo.

kaj preskaŭ deko da instruistoj, por prepari Internacian Olimpiadon pri Matematiko. La staĝanojn necesas elekti pere de konkurso organizita en iliaj licoj, ĉar estas multe pli da kandidatoj ol da eblaj lokoj. Troveblas do tiaj okazaĵoj, kiuj povus plenigi la kastelon dum pluraj semajnoj jare, krom la fakto, ke ankaŭ eblas veni al Grezijono por simpla feriado, sed la nova komitato devos pripensi, kiom da homoj oni akceptu kaj kiajn, kaj ĉu ŝanĝo de la jura strukturo (ekzemple pli klara disigo inter la administrado de la bieno kaj la organizado de la luperiodoj) estus profitata.

Atendante tian evoluon, ni ne forgesu niajn ĉi-jarajn staĝojn! Ili ja daŭros nur kvar semajnojn, de la 17-a de julio ĝis la 14-a de aŭgusto, sed venos famaj kursgvidantoj el pluraj landoj, ni organizos diversajn aktivajn (astronomio, bindado, teatro...), kaj la sukceso de la koncerna staĝo-periodo (vidu: www.gresillon.org) konsistigos gravan elementon responde al la ĉi-supraj demandoj.

François Lo Jacomo



Fotoj: La aŭtoro

▲ **FRINGOJ**, Festa Renkonto Internacia de Geknaboj. Starantaj de maldekstre: François Lo Jacomo, gvidanto de unu el la infangrupoj, Brigitte kaj André Bourdet, kiuj dediĉas po plurcent horojn jare por funkciigi la kastelon, kaj Gérard Fillion, kiu pristudas la bienon kaj la parkon. Dekstre la ĉefa organizantino, Elisabeth Barbay. Sube, la kvara de maldekstre, Mihai Trifoi, estro de la rumana ILEI-sekcio. Foto: la aŭtoro.

Printempa Esperanta sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiujare okazas 6 konkursoj. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

Paralele de tiuj sumoo-oj ni jam tri fojojn organizis Esperanto-sumoojn, konsistantajn nur el japanaj esperantistoj jene: la septembra 2009 kun 18 luktistoj, la novembro 2009 kun 18 luktistoj, la januara 2010 kun 23 luktistoj. En marto, de la 14-a ĝis la 28-a, okazis Printempa sumoo. Paralele okazis "internacia" Esperanto-Sumoo.

Celo: Altigi la legkapablon de esperantistoj. Luktmaniero: Elektu libron, kiun vi legos (hejme) dum la turniro. Decidu kiom da paĝoj vi legos tage. Komencantoj rajtas elekti eĉ infanlibron kun la promeso de 1 paĝo, sed progresintoj elektu malfacilan libron kun la promeso de multaj paĝoj. Se vi legas la promesitajn paĝojn ĝis la noktomezo de tiu tago, vi gajnos ○ (blankan rondon), se ne, ● (nigran rondon). Tiamaniere vi luktas dum 15 tagoj. Ne kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem. Dum la 15 tagoj vi devas koncentriĝi pri la sumoo kaj venki. Malvenko signifas vian maldiligentecon kaj malkoncentriĝon, nome vian malbonan vivmanieron. Ekzemplo de la luktadoj: Leonido (Hokajdo, Japanio), *Homarano*, 3 paĝoj: ●○○ ○○○ ○○○ ●●○ ○●○.

Rezulto de Printempa Esperanto-sumoo 2010: La partoprenantoj estis 33 (japanoj 25, ne-japanoj 8). Tiu ĉi kvara Sumoo estis la unuafoja internacia konkurso, en kiu partoprenis, krom 25 japanoj, po unu el Serbio, Nepalo, Koreio, Ĉinio, Pollando, Vjetnamio, Francio, Finnlando. Ĉiuj bele luktis kaj komprenis la signifon de tiu projekto.



La rezultoj: 15 venkoj: 21 luktistoj. 14 venkoj: 4. 13 venkoj: 1. 12 venkoj: 0. 11 venkoj: 2. 10 venkoj: 1. 9 venkoj: 0. 8 venkoj: 1. 7 venkoj: 2. 6 venkoj: 1. Sumo de venkoj: 448 el 495 (92,37%).

Rekomendo: En la antaŭaj tri sumooj ne estis malvenkintoj (ne ĉiutagaj, sed totalaj), sed tiun ĉi fojon estis 3.

Voĉoj de partoprenantoj: Japanino: Dank' al la sumoo-lukto, mi povis daŭre legi la libron ĉiun tagon. Mi estas tre feliĉa. La ŝipo *KON-TIKI* (kiun ŝi legas) baldaŭ atingos la havenon. Ankaŭ mi daŭre legos ĝis la fino. Dankon!

Dankon! Dankon! Finnino: 157 paĝojn mi legis el 552, sed mi daŭrigos. Nun komenciĝas la parto pri Azio, persekutoj kaj malaprobaj en Azio. Interese! Sen tiu ĉi konkurso mi ne estus leginta la libron. Japano: Dum la pasintaj 15 tagoj mi havis kelkajn malfacilajn luktojn, sed feliĉe mi sukcesis venkadi. Dankon pro la bona projekto!

Venontaj sumoo-oj en 2010: Maja sumoo: de la 9-a ĝis la 23-a. Julia sumoo: de la 11-a ĝis la 25-a. Septembra sumoo: de la 12-a ĝis la 26-a. Novembro sumoo: de la 14-a ĝis la 28-a.

Organizu Sumoon en via lando! Mi esperas, ke la partoprenintoj el landoj ekster Japanio organizos la lukton en sia lando, paralele kun la vera sumoo en Japanio. Tiamaniere en multaj landoj okazos Esperanto-sumooj kaj tio progresigos la movadon.

Hori Yasuo

hori-zonto@water.sannet.ne.jp

La fina venko jam okazis

(Sed ni daŭre plifortigu kaj propagandu nian alternativan internacian lingvon.)

Ni esperantistoj eble preteratentas ion gravan, kio okazis en 1905 en Bulonjo ĉe maro. Lingvo elpensita de lerneĵano en Pollando en la 1870-aj jaroj kaj publikigita en 1887 atingis ion vere rimarkindan: post malpli ol 20 jaroj ĝi eniris la komunumon de homaj lingvoj, ĝi fariĝis lingvo kiel multaj aliaj, kiel la franca, hungara, persa aŭ korea.



Same kiel ili, Esperanto havis parolantaron kaj literaturon, kvankam ankoraŭ etkvantajn en 1905. En Bulonjo, kelkcento el tiu parolantaro unuafoje kunvenis por interparoli kaj interkonatiĝi, ankaŭ spekti teatraĵojn en la nova lingvo, kaj alimaniere distri sin uzante ĝin. Kvankam lingvo kiel la aliaj, Esperanto samtempe estis io unika: alternativa internacia lingvo kun la celo ebligi facilan interkomprenon inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn, kaj tiel espereble instigi pacajn, amikajn rilatojn kaj kultur-interŝanĝojn translandlime.

Ekde la komenco la fina, plej altranga celo de la Esperanto-movado estis tutmonda akcepto de Esperanto kiel internacia helplingvo, ĉies dua lingvo. Ne temas nepre pri oficiala akcepto fare de registaraj instancoj – tion ne mencias la fama Bulonja Deklaracio – sed tamen disvastigado diversmaniera, tiel ke la lingvo estu universale agnoskata kaj uzata kiel la tutmonda interlingvo. Tian akcepton kaj universaligon oni supozeble ankoraŭ hodiaŭ nomas la "fina venko". Indas, tamen, reripensi kaj ririgardi tiun celon.

Ni konsideru kie ni nun troviĝas: Esperanto restas margena fenomeno en la mondo, eble nomo konata de sufiĉe multaj, sed ofte miskonata kaj malserioze traktata. (En mia propra laborkampo, internaciaj konferencoj okazas anglalingve, seninterprete, kaj mia edzino laboras en germana grandfirmao kies internacia interna lingvo estas la angla.) Lingvoj ne ekzistas en vakuo. Malantaŭ la gravaj lingvoj de la mondo staras ŝtatoj kaj ekonomioj. Sed ankaŭ konsideru: ĉiutage naskiĝas miloj da angleparolantoj, francparolantoj, arabparolantoj ktp. Ĉiutage tiuj lingvoj refortiĝas, reŝargiĝas, kvazaŭ aŭtomate. Fronte al ĉiuj ĉi faktoj, ĉu ni ne rekonsideru nian ĝisnunan ideon de la "fina venko"?

Esperanto ja povus iun tagon, iasence, sekvi la vojon de la angla – lingvo dumlonge parolata en margena, periferia, insula angulo de Eŭropo, kiu post kelkaj jarcentoj komencis konkeri la

mondon sur la dorso de la Brita koloniismo kaj imperiismo kaj de la mondkomerco kiun ili grandparte motoris kaj instigis. Margenlingvo fariĝis mondlingvo. Sen nacia ŝtato, armeo kaj komercistaro malantaŭ si, ĉu Esperanto povus esperi sekvi la malmargeniĝan padon de la angla? Iom dube. Sed Esperanto, kvankam margenlingvo, estas tamen jam mondlingvo – ĝi margenas, sed ĝi margenas tutmonde, ne unuinsule. Esperanto estas lingvo kies parolantaro, kvankam malgranda (sed, mi kredas, ne pli malgranda ol la island-parolantaro), konsistigas internacian komunumon de homoj kiuj aprezas la lingvon, ĝiajn mirindajn

simplecon, flekseblecon, belsonecon kaj esprimivon, deziras kaj tenas internaciajn kontaktojn per tiu lingvo, kaj aliĝas al la pacaj, amikecaj celoj de la Esperanto-movado. Krome, malkiel la angla, ĝi estas nenies nacia lingvo, ĝi estas neŭtrala – ĉiu esperantisto estas egala al ĉiu alia, kio estas tre valora afero. Kaj mi ripetu, ekde Bulonjo, Esperanto estas unu el la lingvoj de la mondo – granda atingo – kun parolantara komunumo, literaturo, kaj eĉ kulturo kaj tradiciaro. Estas ĝuste tio ĉi, kion la Esperanto-movado antaŭ ĉio devus subteni, pluvivigi, plifortigi kaj diskonigi, samtempe malemfazante ĝian klasikan finvenkan celon.

Multaj el vi verŝajne trovos en miaj vortoj reaserton de raŭmisma vidpunkto – unue prezentita en la Manifesto de Raŭmo, konata en Esperantujo jam dum 30 jaroj, do nenio nova. Jes, mi konfesas ke mi simpatias al raŭmismo, preferante pli realisman aliron al la antaŭenigo de nia lingvo. Sed, estas iom komplika afero, ĉar fakte grava elemento de tiu Esperanta kulturo kaj komunumo kiun mi deziras plifortigi, estas ĝuste la finvenkisma idealismo. Nia himno ja estas finvenkisma himno. Do, kion mi verdire proponas, estas diferencigo inter du specoj de idealoj. Estus ideale se ĉiu en la mondo lernus kaj uzus neŭtralan ĉiesduan helplingvon. Estus ideale se la Eŭropa Unio adoptus neŭtralan helplingvon. Estus ideale, se ĝuste Esperanto estus tiu lingvo. Sed ankaŭ ekzistas alia nivelo de idealoj, mi nomu ilin "idealaj praktikeblaj". Mi memoras, ke dum la Aŭgsburga UK en 1985 aperis artikolo en la kongresa kuriero, laŭ kiu iu loka gazeto skribis ke Esperanto (aŭ la Esperanto-movado) estas "realigita utopio". Perfekta priskribo, mi pensas. Jen la kerno de la afero.

Do, kion tio signifas por la Esperanto-movado? Estas gravege propagandi, instrui, disvastigi Esperanton, kiel fakte ĝis nun multaj movadanoj faras tra la mondo, ĉar alie la komunumo forvelkus. Ni devas konstante reĵunigi kaj refreŝigi

nian komunumon. Tamen, kion propagandi? Ĉu Esperanton kiel la solvon por la (supozata de ni, sed ne nepre de aliaj) "monda lingva problemo", dua lingvo por la tuta homaro? Aŭ ĉu Esperanton kiel alternativan internacian lingvon kiu ebligas facilan, egalecan komunikadon, komunan duan lingvon de grupo kiu elektis lerni ĝin? Alivorte, ĉu Esperanton kiel estontan tutmondan helplingvon, aŭ ĉu kiel estantan tutmondan helplingvon de volonta komunumo de pacamaj, mondĉivitanemaj parolantoj?

Mi kredas ke tiu dua speco de propagandado devus esti la ĉefa, la unuaranga – la alia, duaranga. La dua temas pri praktikeblaj idealoj, la unua pri idealo nepraktikebla almenaŭ en la nuna epoko. Denove, sen ŝtato, nacio kaj ekonomio subtenantaj ĝin, mi honeste dubas ĉu tiu ĉi idealo iam realiĝos. Sed, ni ne forĵetu la idealon. Male, la finvenkcela idealo estas esenca parto de nia kulturo kaj tradiciaro. Temas ĉefe pri malemfizado de tiu celo, pri realisma aliro, pri plifortigado de tio, kion ni jam havas. Kaj tute ne temas pri malemfizado de la "interna ideo" de Zamenhof, t.e. "forigi la murojn inter la gentoj kaj alĉutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton". Tiu nobla celo estas ĉiam alstrebinda kaj praktikinda, eĉ se nur malgrandskale.

Kiel do rolas UEA en mia skemo? Mi opinias ke ĝi estas la esenca, nemalhavebla organizaĵo de la Esperanto-movado kaj komunumo. Kvankam finvenkema, neraŭmema, ĝia ĉefa agado estas servi la hodiaŭan esperantistaran komunumon. Fakte, la finvenka celo de tutmonda akcepto de Esperanto kiel ĉies dua helplingvo ne troviĝas inter la kvar ĉefceloj de UEA – disvastigado de Esperanto kaj agado por solvi la lingvan problemon, jes, sed finvenka celo, ne. Kiel Jouko Lindstedt, iniciatinto de la Raŭma Manifesto, skribis antaŭ kelkaj jaroj, UEA estis "sufiĉe 'raŭmista' organizo" ekde la komenco kaj estis kreita ĉefe por organizi kaj servi la komunumon.

Do, laŭ mi, ne necesas iu aparta raŭmista kvazaŭ-ŝtateto por la esperantistaro: ĝi ne estas iaspeca nacio kiu bezonas propran ŝtaton; ĝi mem pontas ŝtatojn, naciojn kaj naciajn lingvojn; ĝi kunigas homojn el diversaj nacioj kaj gentoj. Kion do ni, la esperantistara ne-nacio, bezonas? Verŝajne malmultaj el ni malkonsentus kun jena listo: forta gazetaro, fortaj eldonejoj, forta literaturo (beletra, scienca, ĉiuspeca), forta retejaro, fortaj kongresoj, forta instruado de nia lingvo, forta informado al la ekstera mondo pri niaj lingvo kaj komunumo... kaj forta UEA por subteni kaj antaŭenpeli ĉi tiujn agojn. Aŭ mi pli precize diru en ĉiu kazo "pli forta(j)" ĉar mi ne volas sugesti ke ĉiuj kampoj nuntempe malfortas. Certe, facilas konstati la bezonon de ĝenerala plifortigado, sed ĉio ĉi postulas kompreneble kaj unuavice plian monon. Ni devas elpensadi kiel ĝin akiri: Ĉu per grandaj kampanjoj por instigi mondonacojn de esperantistoj diverse? Ĉu per varbado de donacoj kaj subvencioj el aliaj fontoj, ekz. Eŭropa Unio, privataj fondaĵoj, mecenatoj? Ĉu per profitcelaj komercaj agadoj?

Mi finu jene: Malgraŭ ke la tradicia "fina venko" ankoraŭ restas malproksime preter nia horizonto, Esperanto estas sukceso. Al aserto de multaj ne-esperantistoj ke Esperanto malsukcesis, ni respondu ke ĝi sukcesas, eĉ ke ĝi jam sukcesis. Lingvo kreita de eŭropa lernejo en la 19-a jarcento kaj unue aperinta en formo de modesta broŝuro disvastiĝis tra la mondo kaj parolatas en japanaj urboj kaj la brazila kamparo, studatas en ĉinaj universitatoj kaj afrikaj lernejoj, riĉas je literaturo kaj muziko. Iasence, tion ĉi mem oni povus rigardi kiel la "finan venkon", sed ni iru plu kaj proponu ke ni traktu jam la Bulonjan kongreson kiel la "finan venkon" de Esperanto! Ĉar verdire, en tiu loko, en tiu momento, Esperanto fariĝis lingvo plensenca, kaj fakte funkcia internacia lingvo. Esperanto estas jam delonge vera, vivanta lingvo, kiu proksimigas homojn, kaj tio estas la vera "fina venko".

Nyegosh Dube

Ju pli oriente, des pli bone: pri la 3-a Mezorianta Kunveno kaj la 1-a Turka (Junulara) Kongreso

La turka, kiel Esperanto, estas aglutina lingvo (pardonu: 'kunmeta' en mia dialekto!), kaj la nomo de la urbo Eskiŝehiro estas kunmetita de la du pecetoj "malnov-" kaj "urb-".

Malgraŭ la nomo, tamen, la urbo estas tre moderna universitata urbo pli proksima al Ankaro ol al Istanbul. Do, pli oriente ol la pasintjara kunvenurbo Iznik. Tien kunvenis multegaj turkoj, multaj eŭropanoj kaj unu israelano por la 3-a Mezorianta Kunveno. La kunveno okazis de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo 2010.

Estis prelegoj. Unu estis de Ben Indestege pri vojaĝado tra Egiptio, Sudano kaj Etiopio. Se vi ne aŭskultis ĝin, vi ne scias, ke via televido trompas vin pri la stato de la lando Sudano, almenaŭ en ĝia norda parto. La dua prelego estis de Mireille Grosjean pri la agado de UEA en la kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo kun abundaj ekzemploj, kiuj

donis al la partoprenantoj la senton esti mem en la granda salono de UN. Tamen tre sukcesaj estis la programeroj bazitaj sur ĝeneralaj diskutoj, en kiuj tre aktive povis partopreni ankaŭ la turkaj junaj esperantistoj ĉeestantaj. Anna Löwenstein organizis la diskutojn. Tre kongrue kun la lando unu el la diskutoj temis pri la leĝoj pli kaj pli oftaj en Eŭropo pri malpermesoj porti la islaman vualon. La rezulto de la diskuto ne estis unueca, ĉar la motivoj malantaŭ tiuj leĝoj ne estas klaraj kaj ofte tute ne temas pri klopodo liberigi virinojn sed pri klopodoj perforti la islamanojn al tuja eŭropeco.

La kunveno estis unusence ankaŭ la unua tutturka kunveno de esperantistoj, ĉar krom la homoj el Istanbul komencis aperi homoj el aliaj turkaj urboj, kiuj lernis Esperanton per la reto (La kurso de Esperanto de Carlos Pereira en la turka versio ŝajnas esti la preferata). La junaj turkoj, cetere, estas la rezulto de la kursoj de Murat



Itala Esperanto–Federacio 100-jara, sed tute juna kaj preta por la dua jarcento.

Florenco, la 20-an de marto 2010. Estis festa etoso kaj printempa etoso en la solena Salono de la ducent (popolaj reprezentantoj en la mezepoka urbo) en la tiel nomata Malnova Palaco en Florenco. Temas pri Salono por kies konstruado voĉdonis jese Dante Alighieri, kiu neniam sukcesis vidi ĝin preta.

Ĉar Itala Esperanto-Federacio estis fondita ĝuste en Florenco en la fino de marto de la jaro 1910, en ĉi tiu salono kunvenis esperantistoj el la tuta Italio kaj aŭskultis interesajn prelegojn. Unue salutis la reprezentanto de la urbo, Eugenio Giani, kiu estis ankaŭ ĉe la inaŭguro de la UK en Florenco, kaj de tiam restas agrable impresita, ĉar "mi mem vidis du mil homojn, kiuj parolas Esperanton. Tio estas nekredebla!" Salutis la prezidantino de la Unesko-klubo en Italio. La itala nacia komisiono por Unesko patronis la kunvenon.

La prelegoj estis iom nekonvenciaj. Fakte neesperantista profesoro el la universitato de Milano, Massimo Rizzardini, prezentis la idean klimaton de la jaro 1910, kiam IEF estis fondita. Estis granda periodo ne nur por Esperanto tiam. La aliaj prelegoj estis de Federico Gobbo kaj Paolo Valore, ambaŭ ligitaj al la universitato de Milano, kiuj parolis pri tio, kio espereble okazos dum la estonteco kaj prezentis la projekton InKoj = Interlingvistikaj



Kajeroj (vidu ĉe <http://riviste.unimi.it/index.php/inkoj/>). Esence temis pri tio, kio devas okazi en la dua jarcento de IEF. En la sama direkto iris la saluto de Itala Esperantista Junularo, kiu substrektis la facilan kunlaboron jam starigitan kun la tiel nomataj "novaj italoj" (filoj de enmigrintoj).

Nicola Minnaja prelegis pri esploro komencita en la internacia jaro de lingvoj por taksu la influon de fremdaj vortoj en la itala lingvo parolata de lernejanoj.

Poŝtaj oficistoj malsupre en la palaco havis sian oficejon kun porokaza poŝta stampo.

Mi mem prezidis la feston kaj resumis. La vera resumo estas: Celebrado de centjariĝo ne estas okazo por rigardi malantaŭen, sed por rigardi antaŭen. Ni en IEF neniam estis tiel pretaj paroli pri Esperanto al la mondo, kiel montris ankaŭ la bela afiŝo, kiu estis afiŝita tra la urbo en la antaŭa semajno.

Renato Corsetti

► Ozdizdar kaj de Teresa Kapista, kiu ĉiujare venas antaŭ la Mezorianta Kunveno por instrui dum 15 tagoj en liceo en Istanbul.

Ne povis manki la vesperaj programoj, kies ĉefa ero estis la prezento de scenoj el la rakontoj pri Nasredin Hoĝa, kiu vivis en ĉi tiu regiono, kaj kies famo nun iras de balkanaj landoj al Ĉinio, kiu donis al ni libretojn en Esperanto.

Se mi devus sumi la aferon per unu frazo, mi dirus, ke la Komisiono pri Agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko ne sukcesis en ĉi tiu kunveno enplekti multajn arablingvanojn, sed certe ĝi ĉi-jare starigis la fondajon por la rekreo de la Turka Esperanto-Asocio.

Por la venonta jaro la plano antaŭvidas kunvenon en du partoj, unu el ili devus okazi en la oriento de la oriento, en Irano en insuleto en la araba/persa golfo kaj

unu en la okcidento de la regiono, en Tunizio, por tiuj, kiuj ne povos iri al la alia. Vi scias, ke la Meza Oriento estas la lando ne nur de la mil kaj unu noktoj sed ankaŭ de la mil kaj unu problemoj por ricevi vizojn.

Renato Corsetti



Supera biografio de Zamenhof

Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof. Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado / Kaunas: Sezonoj / Litova E-Asocio, 2009. 320p. 21cm. Bind. ISBN 9786099508702. Prezo: € 27,00

La zamenhofa jubileo stimulis miriadon da verkoj, celebradoj, tradukoj, studoj, prelegoj, kunvenoj, eĉ la fondon de tute nova revuo *Homarane* (rimarku la adverbbon!). La intereso pri Zamenhof direktiĝis ege pli multe al lia ideologio ol al la lingvohistorio, de kiu tamen aperis interesaj detaloj apenaŭ konataj. Esploroj kaj kritikoj, enarkivaj traserĉoj, perlupeaj deĉifroj de dokumentoj; en tiom da produktoj elstaras *Homarano*, verko de la nuntempe plej dokumentita zamenhofologo, Aleksandro Korĵenkov. Absolute sensoifiga. Por tiu kiu soifas scii, kiu estis la vera el la multaj nomoj, L. Zamenhof, L.L. Zamenhof, L. Samenhof ktp, la aŭtoro respondas en la unua ĉapitro, *Vojaĝo inter la nomoj*, per plena listo ĉerpita el 97 enciklopedioj en 19 lingvoj. Eĉ nur la antaŭnomo havas 34 variantojn: de Lajos al Ljudvig-Lazar, pasante tra Louis kaj Lejzer Ludwik, L'udovit Lazár ktp. La transskribo de la familia nomo alportas plian dudekon da kombinoj, se ni flankelastas tiujn pri la familianoj. Temas ne nur pri kuriozaĵo, temas ja pri tre interesa foto de la diverskultureco bildiĝanta tra la nomtransskriboj.

La pluaj ĉapitroj rakontas pri lia vivo, komencante de la juda medio kaj de la studentaj jaroj. Ni pasas tra la forte praktikata judismo, la cionistaj societoj, lia verkado ruslingva kiel stimulant de sia popolo kontraŭ asimiliĝo kaj kuraĝigo al trovo de maldense loĝata teritorio por establi judan komunumon. Je la demando, ĉu tiom da sciigoj ne estis jam elĉerpe kolektitaj de Waringhien kaj Maimon, de Holzhaus kaj Ludovikito, la respondo estas: ili estis ja kolektitaj, sed nur parte, kaj estis aperintaj tute dise; ĉi tie ili estas ampleksigitaj, orde kunigitaj, komparataj kaj prinotataj en la diversaŭtoraj kontraŭdiroj. Vere benediktana laboro, farita kun esperantista pasio kaj historiista (kaj instruista) kompententeco.

Multaj tekstoj estas menciitaj, sed ne multaj estas cititaj; ofte por la plena teksto la aŭtoro resendas al sia propra antologio *Mi estas homo*, kompilaĵo certe ne elĉerpa (Zamenhof verkis milojn da paĝoj!), sed plene adekvata por prilumi la personecon de la Majstro rekte el liaj linioj¹. Tial leganto povus resti kun iom da amaro en la buŝo, ĉar por plene kompreni la tezojn prezentitajn li devus iri al alia verko.


1) Se licas mencii sin mem, la recenzanto kompilis itallingvan antologion de Zamenhof, ĉerpante inspiron kaj kelkfoje elrusigojn ĝuste el *Mi estas homo*.

Taŭga akcento estas metita sur la kvar jaroj pasigitaj de Zamenhof kaj lia familio en Grodno; ofte eĉ la atentaj legantoj de la revuo *La Esperantisto* ne konsciis pri la efektiva malriĉeco de la jam ne plu juna doktoro, pri la oferoj de li (kaj, sekve, de lia familio) al la "sankta afero". Malfruo en la aperigo de la revuo, transdono kaj repreno de tia malprofita iniciato kia estis la revuo mem, ĝia transformo al ia speco de antaŭtempa persona blogo, kiel ni konceptus ĝin hodiaŭ: ĉio ĉi trovas detalan rakonton en la libro, kiu legiĝas kiel romano, preciza tamen neniam pedanta, informoplena, tamen neniam teda, kun leĝeraj personaj anekdotoj².

"La tuta afero Esperanta estas nur *parto* de tiu komuna ideo, kiun mi nomas Hilelismo"; tiel skribis Zamenhof al Javal la 24.9.1905, sed "tiu komuna ideo" estis jam amputita de la "Deklaracio pri esperantismo", akceptita en Bulonjo, deklaracio nete disiganta la lingvon de ĉia ajn ideologio. La lingvo kreis popolon: *la lingvo estas mia nacio* diros la Rezolucio de PEN lanĉita en Santiago de Kampustelo en septembro 1993; male, Hilelismo fadiĝas pli kaj pli fone sur la esperantista scenejo. Zamenhof aŭtoritate ja, sed malkomplete, oratoros pri la *interna ideo*, sed limigos ĝin al la esperantismo, kaŝante ĝian apartenon al la universalismo de *religio neŭtrale-homa*, heroldanta moralon eĉ pli vastan: la unuiĝo de la homaro.

Interesa la korĵenkova analizo, nun pli kaj pli akceptata de la zamenhofologoj, ke Lazaro Ludoviko kabeis retiriĝante de la movado kaj lasante la (iam "sanktan") aferon de la lingvo kaj de ĝia disvastigo en la manoj de organizaj spertuloj: jen Bourlet, Boirac, Cart. Analizo hereza kaj skandala, se legata tra ĝisostulaj okulvitroj, sed tute adekvata: Zamenhof volis liberiĝi el la movado, kiu lin ĉikanis per sennombraj disputoj inter la francaj elstar(em)uloj en la unuaj dek jaroj de la dudeka jarcento, tute same kiel ĝi estis disputcentro en la juda-pola-rusa-germana elito dum la tuj antaŭa jardeko. Sed la grandskala elpaŝo kun hilelismo, poste evoluinta al homaranismo, estis ĉiam prokrastata: la unua broŝuro estis provbalono, posta eldono restis sen adekvata disvastigo. El la esperantistoj neniu aliĝis al homaranismo, adeptojn al ĝi Zamenhof klopodis trovi ekstere, kaj la rolo de la lingvo en ĉi

2) Kun ĉi tiu juĝo plene kongruas F. Degoul en *Literatura foiro* (243), kie oni legas (p. 10): *Apenaŭ kredeblas en la libro tiu ekvilibro inter plezuro de legado kaj abundo da precizaj informoj*.



tiu pli vasta ideo iĝis tute margena: en la, cetere jam malfrua, provo pri lanĉo de homaranisma kongreso Zamenhof tre timeme petas de siaj Esperanto-amikoj rolon preskaŭ nur de tradukantoj de alvoko. Vidante la etan sukceson (tamen sukceson!) de la lingvo, li esperas, ke la pli vasta ideo de unu ĝenerala religio trovos pli da adeptoj; kaj, ĉar eĉ tiu restos seneĥa, li transiras al ankoraŭ pli granda, la tuthomara unuiĝo. Kvazaŭ sportisto kiu, ne eltenkapabla pri 100-metra kurado, volas sin elprovi sur dekmilmetra, kaj, kompreneble kolapsinte ankaŭ sur tiu, insistas defii sin mem en maratona distanco.

En *Heroldo* (n-ro 2151) aperis stimula recenzo plume de Giorgio Silfer, komparanta ĉi tiun verkon kun *Mi estas homo*, por kiu ĝi esprimas preferon surbaze de ideologiaj parametroj, laŭ mi tamen ne tute prikonsentebaj; la jam

piednote menciita studo de François Degoul estas sespaĝa esejo, klasifikanta *Homarano*-n "nediskuteble supera al ĉiuj ĝis nun eldonitaj biografioj de Zamenhof". Mi plene aliĝas al tiu ĉi juĝo. Komparo kun *Mi estas homo* aŭ preferindeco pri "Zamenhof-fokusa" pliampleksigo de la unuaj ĉapitroj de *Historio de Esperanto*, kiel sugestas Silfer, ne ŝajnas al mi nepraj en la prezento de *Homarano*: kompreneble ĝi etparte surmetiĝas al la du menciitaj korjenkovaj verkoj, sed ĝi havas nek la celon historii pri la lingvo, nek la celon antologii pri ĝia iniciatinto. Ĝi perfekte (se perfekteco ekzistas) plenumas la celon de la subtitolo: *La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof*. Ĝin legos kun granda plezuro esperantistoj, historiistoj, filozofoj, universalistoj kaj ... ŝatantoj de biografiaj romanoj.

Carlo Minnaja

Temoj taŭge traktitaj

Ĉio fareblas. El la franca tradukis Martine kaj Christian Rivière. Cholet: Éditions Pour penser à l'endroit, 2006. 16p. 20cm. ISBN 9782915125238. Prezo: € 6,00.

Ĉu mi malplaĉis al vi? Marie-France Conde Rey. Angulemo: Ĉarenta Esperanto, 2008. 20p. 15cm. ISBN 9782953130812. Prezo: € 6,30



Bele estas konstati, ke nuntempe aperas en Esperanto pli kaj pli da belaj kaj ĉarmaj libroj, kiuj celas junajn infanojn. Diversformaj, kaj prezentantaj rakontojn diversstile, ĉi tiuj libroj riĉigas la librobreton de infano.

Libroj por legi enlitiĝe estas certe aprezataj de infanoj, sed ne malpli utilaj estas tiuj, kiuj ne timas pritrakti tiklajn, kaj por infanoj ofte ege ĝenajn kaj enormajn, problemojn de la ĉiutaga vivo.

Ĉi tiuj du libroj estas ĝuste tiaj, kvankam ili tute malsimilas en siaj prezento kaj stilo. Ambaŭ, tamen, postulas legadon en komforta etoso kun la apudeco de plenkreskulo preta respondi al postaj demandoj.


Ĉio fareblas estas la pli leĝera el la du, tute taŭga kiel amuza rakonto por legi enlitiĝe. Sed malantaŭ la amuzo kaŝiĝas la celo komuniki al la infano vivofilozofion. Tamen, ne timu, certe ne temas pri io truda. Ĉiuj ni scias, ke aperas en la vivo de ĉiu infano momento kiam tiu subite konstatas, ke la simpla esprimado de forta deziro ne estas garantio, ke tiu deziro plenumiĝos. Plenkreskuloj, jam plurfoje spertintaj la malagrablan senton de 'nepovo', malhelpas foje al siaj infanoj, kiuj volas ankoraŭ fidi ke ĉio fareblas. Ĉi tiu rakonto, la unua en Esperanto el serio titolita "Historioj por pensi ĝustasence" (kial 'historioj' kaj ne 'rakontoj'?), celas kuraĝigi infanojn (kaj ne nur) adopti ian pozitivan perspektivon. Ĉu ne veras, ke pensante pozitive oni multon

atingas? La libro bunte belas, ĝi eĉ prezentas iom tro da okulfrapaj koloroj, sed eble kelkaj infanoj bedaŭre trovos nek la feinan rakonton nek la bildojn laŭ sia gusto. Malgraŭ tio, la libro transdonas vere belan mesaĝon.

Ĉu mi malplaĉis al vi? estas alistila libro. Ĝi prezentas tre kortuŝan rakonton pri neatendita rompiĝo de interamika amo. Sciuro kaj musino pasigas kune belajn momentojn, sed venas subita kaj neatendita fino al tiu belo. La sciuro dolore sin demandas kial. Foje nescio estas pli terura ol scio, ĉar oni bildigas al si ĉiaspecajn kialojn por la forpuŝo. Kaj ne nur, oni sin demandas kion fari, kiel pretervivi. Plenkreskuloj povas alvoki al sia helpo racian pensadon kaj kapablas, se ili deziras, klare esprimi siajn sentojn. Ĉi tiu rakonto helpas al juna infano, kiu plej ofte simple 'sentas' kaj ne kapablas eldiri siajn plej timigajn pensojn, kompreni ke ankaŭ aliaj spertas similajn dolorojn, kaj ke tamen ja estas iaspeca solvo. Ĉi tiu rakonto simplas kolore kaj stile. La bildoj estas nigrablankaj kaj kvazaŭ invitas infanon ilin kolorigi.

Neniam estas tro frue diskuti pri ajna temo kun infano, kondiĉe ke oni tion faru en manieroj kongruaj kun la aĝo kaj percepta evoluo de la juna aŭskultanto. Ĉi tiuj du libroj havigas ĝuste tre taŭgajn enkondukojn al gravaj temoj. Plenu la librobreton.

Angela Tellier



Salutinda eldonaĵo

Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo. Aktoj de la studtago en la universitato de Florenco, 26a de julio 2006a. (Multilinguismo e Società 2008). Red. Renato Corsetti. Pisa: Edistudio, 2008. 128p. 24cm. ISSN 20364482. Prezo: € 15,00

Por atingi vere novajn sciencajn rezultojn, i.a. necesas konsideri la laborojn de la antaŭuloj. Pro tio salutindas la fojfoja apero de memorlibroj (lastatempe ekz. pri István Szerdahely) aŭ kolokvoj omaĝe al elstaraj interlingvistoj, por ke iliaj laboroj ne forgesiĝu.

Tia kolokvo (titolita eble tro modeste "studtago") en 2006 okazis memore al grava itala lingvisto kaj interlingvisto, kies influo efikas ĝis la nuno kaj al kiu kunŝuldiĝas la konsiderinda interlingvistika tradicio en Italio. Unu el la plej renomaj personoj en la lingvistika historio de Italio, Bruno Migliorini (1896-1975) – kies centa datreveno de la naskiĝo donis la okazon por la aranĝo – en sia junaĝo ne nur estis entuziasma esperantisto kaj kursgvidanto, sed en 1923 eĉ fariĝis membro de la Lingva Komitato kaj poste vicprezidanto de la Akademio de Esperanto (1933-36). Li estis UEA-delegito, kunlaboris leksikografie, recenze kaj esee, verkis foje poemojn, reviziis literaturajn tradukojn kaj aŭtoris instrulibron ĝis nun uzatan. Li krome tenis kontaktojn kun aliplanlingvaj movadoj (i.a. kun Giuseppe Peano pri Latino sine flexione). De 1969 ĝis 1973 li apartenis al la redakta komitato de *La Monda Lingvo-Problemo* (LMLP).

En sia lingvistika fako li aparte famiĝis kiel aŭtoro de ĉefverko pri la historio de la itala lingvo (*Storia della lingua italiana*, 1960); li estis ĉefredaktoro de la Itala Enciklopedio kaj aŭtoro de amaso da aliaj lingvistikaj verkoj (lia persona bibliografio ampleksas 185 paĝojn). De 1949 ĝis 1963 li estis prezidanto de la plej prestiĝa lingvokultura institucio de Italio, la Accademia della Crusca, kiu kune kun Akademio de Esperanto okazigis la studtagon honore al li. Kiel Christer Kiselman en sia antaŭparolo substrekas, tia kunlaboro inter AdE kaj nacia akademio jam havas certan tradicion (Zagrebo 2001, Gotenburgo 2003).

En la disponeblaj aktoj la jubileulon rekte koncernas la salutoj de lia filo Paolo Migliorini, elstarigoj de la signifo de la omaĝato deflanke de la aktuala prezidanto de la Accademia della Crusca Francesco Sabatini (Florenco) kaj la lingvisto Tullio de Mauro (Romo). Carlo Minnaja (Padovo) skizas la kontribuon de Migliorini al la Esperanta kulturo, supozante, ke la silentiĝo de la lingvisto ekde 1947 ŝuldiĝas al por Esperanto negativa atmosfero en italaj universitataj rondoj. Minnaja prave postulas la kompletan eldonon de ĉiuj interlingvistikaj verkoj de Migliorini (cetere, en 1985 kaj 2006 Edistudio aperigis la daŭre legendan kolekton *Lingvaj aspektoj de Esperanto*). Renato Corsetti (Romo), post revuado de la ĉefaj instrumentodoj de

Esperanto, montras, ke la gramatika metodo, aplikata en la kelkfoje reeldonita kaj jam dum 80 jaroj uzata lernolibro (*Manuale di Esperanto*, ekde 1923), aparte taŭgas por kleraj kaj memstudemaj lernantoj.

La aliaj 6 tekstoj rilatas ĉefe al esperantologio. Fabrizio Pennacchietti (Torino), influita de la dana lingvisto Viggo Brøndal (1887-1942), prezentas proponon klasifiki la prepoziciojn de Esperanto laŭ jenaj klasoj: dimensiaj, nedimensiaj, aplikaj, retroaplikaj kaj kombinaĵ prepozicioj. (Cetere, i.a. jam Eugen Wüster en 1924 kaj Victor Sadler en 1985 [dum la Esperantologia konferenco en Aŭgsburgo] klopodis pri klasifikoj kaj sistemigoj de la Esperantaj prepozicioj. Humphrey Tonkin (Hartford) elstarigas la komprenon de Zamenhof pri la lingvo-evoluiga kaj lingvo-stabiliga roloj de literaturo, rememorigas nin pri lia lingvokomunumo-krea agado dum la unuaj jaroj kaj poste traktas la signifon de la Hamlet-traduko. Laŭ Tonkin Hamleto estas la "plej universale konata teatraĵo" (p. 51). Li komparas ambaŭ tradukojn (L. L. Zamenhof 1894, L. N. M. Newell 1964). La Zamenhofa traduko laŭ li estas "Esperanta", kaj tiu de Newell estas pli fidela al la originalo: "Newell estas por legi, Zamenhof ankaŭ por ludi" (p. 53). Geraldo Mattos (Campinas)

okupiĝas pri la Fundamento kaj montras kelkajn dubajn kazojn kaj kontraŭdirojn inter la Fundamenta Gramatiko kaj la Fundamenta Ekzercaro, nekonsekvencaĵojn en la lingvouzo de Zamenhof kaj kritikis i.a. PAG. Laŭ li eblas venki la deviojn, se oni ilin konscias (i.a. pri akuzativo de almovo en kelkaj okazoj, false kunmetitaj vortoj, ĥaosa uzo de la difina artikolo). Giordano Formizzi (Verono) sisteme revuas la rolon de la universale reforma pedagogo Jan Amos Komenský (1592-1670) por la lingva edukado (studado de lingvoj, universala lingvo, influo al la postaj projektoj de internacia lingvo ktp). Li substrekas, ke la projekto de universala lingvo ĉe Komenský apartenas al la "ĝenerala reformplano de la socio kaj edukado" (p. 97). Ni povas konkludi kun Formizzi, ke ankaŭ Esperanto povus ludi pli grandan rolon, nur se en la internaciaj sociaj kondiĉoj ne plu regus la 'racio de la forto', sed la 'forto de la racio' (p. 99). Esperantonimoj laŭ Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu) estas "leksemoj, kiuj reflektas ekskluzive la Esperanto-kulturon, kaj kiujn ne eblas 'simple traduki' (sen kulturologia komento)" (p. 100). Li prezentas riĉan materialon (kun tre sistema aldona superrigardo kaj kun klaraj fontindikoj), kiu pli klare ol multaj asertoj pruvas la ekziston de originala kulturo de la lingvo-komunumo de Esperanto. Melnikov



ordigas la esperantonimojn laŭ formo, lingvistikaj operacioj kaj rimedoj por marki ilin en la teksto. La lasta eseoj estas tre mallonga skizo de Amri Wandel (Jerusalemo) pri la nuntempa rolo de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Italaj resumoj fine de la tekstoj ebligas ĝeneralan orientiĝon al la eventuala itala leganto. La aldonita programo montras, ke kelkaj anoncitaj prelegantoj aŭ ne povis partopreni aŭ ne povis liveri siajn manuskriptojn, nome Nico Sica (Milano), Mukunda Phatik (Katmanduo) kaj la bedaŭre antaŭ nelonge forpasinta Mauro La Torre (Romo). La teknika redakto

de la volumo verŝajne suferis pro iuj komputilaj misaĵoj. Jam sur la kovrilo ni legas pri "Multlinguismo" anstataŭ "Multilinguismo". La plej multaj literaturlistoj montras kaprican strukturon (p. 43 kaj sekvaj, 54 ks, 66, 79, 115 ks). (Cetere, en tiaj listoj, do ankaŭ ĉe aliaj publikaĵoj, min daŭre ĝenas la mallongigitaj antaŭnomoj.) Ankaŭ en la tekstoj fojfoje aperas enigmaj simboloj sen klarigoj. Nu, tiuj estas detaloj, kiuj ne malgrandigas la valoron de la tre rekomendinda antologio.

Detlev Blanke

Aziaj mov(iĝ)oj

Esperanto kaj mi – eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj – Memoraĵo de la 94-a japana Esperanto-Kongreso, oktobro 2007. Red. Hori Jasuo. Maebasi: Horizonte, 2007. 206p. 26cm. ISBN 9784939088061. Prezo: € 13,50.
Raportoj pri la Invitprojekto – 20 invititoj el Azio al la UK en Jokohamo. Tôkyô: Invitkomitato de Japana Esperanto-Instituto, 2007. 71p. 30cm. Prezo: € 4,80



La ideo kolekti eseojn kun la temo 'Esperanto kaj mi' kreskis ĉe Hori Jasuo, la tiama prezidanto de la Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), kiam li konsciis ke, post la UK en Japanio, sekvos aŭ devus sekvi epoko de Azio rilate la Esperanto-movadon. Ne nur UK en Azio kaj Aziaj Esperanto-Kongresoj, sed ankaŭ la organo de la menciita Komisiono ligas aziajn esperantistojn, tamen tio ne sufiĉas. Ne ĉiuj povas ĉeesti kongresojn, kaj raportoj ne estas sufiĉe personaj por koni la sentojn de esperantistoj pri Esperanto. La redaktanto deziras ke legante la eseojn de nekonataj esperantistoj loĝantaj malproksime "ni konatiĝu kaj havu pli solidaran senton unu kun la alia".

Kolektiĝis en la esaro 180 eseoj de esperantistoj el dek sep aziaj kaj du ne-aziaj landoj. La kontribuantoj, de plej diversaj aĝoj, rakontas en siaj eseoj pri sia(j) rilato(j) kun Esperanto: kiel ili ekkonis kaj lernis ĝin, kion Esperanto signifas por ili, kiun rolon ĝi ludas en ilia vivo, kiel ili eble provas diskonigi ĝin ktp. Temas pri kelkaj internacie konataj esperantistoj, kiel ekz. Probal Dasgupta, Mohammed Reza Torabi, Lee Chong-Yeong kaj Lee Jung-Kee, sed plejparte pri ne tiom konataj samideanoj – kaj komencantoj kaj multjaraj esperantistoj. Iliaj rakontoj estas enhave, stile kaj lingve tre malsimilaj, kio kompreneble kontribuas al la ĉarmo de la verko. La redaktanto sukcesis en tio ke tra la eseoj oni povas iom ekkoni la spertojn kaj sentojn de esperantistoj el pluraj

landoj de – por ne-azianoj – alia kontinento. Bedaŭrinde estas tamen ke la redaktanto ne multe redaktis la tekstojn, pro tio ke li "ne volis malhelpi la entuziasmon elŝpruci el la eseoj per arbitra korektado". Tio povas validi kiam temas pri stilo, sed ne por [tajp]eraroj, kiujn oni tre kaj tro ofte renkontas.

Samspeca kaj iugrade samstila estas la *Raportoj pri la Invitprojekto*, en kiu 20 aziaj esperantistoj, invititaj de Invitkomitato de Japana Esperanto-Instituto por partopreni la Universalan Kongreson en Jokohamo en 2007, rakontas pri siaj preparoj al, spertoj dum kaj planoj post la 92a UK. La invititoj ne nur ricevis la vojaĝon al Japanio, la aliĝon al UK kaj manĝon kaj loĝadon dum la UK, sed ankaŭ gastis dum mallonga aŭ pli longa periodo antaŭ kaj/aŭ post ĝi ĉe japanaj esperantistoj. Tiuj individuaj prizorgantoj ankaŭ verkis – foje tro – koncizan raporteton pri siaj – plejparte, sed ne nur, pozitivaj – spertoj kun la invititoj en ĉi tiu raportaro. Ankaŭ la invititoj mencias ne nur pozitivajn spertojn: ili rimarkigas kaj foje eĉ kritikas tion kio okazas (aŭ ne) dum la UK. Tiu realismo donas pli altan valoron al la, cetere simple eldonita, kompilaĵo. La raportaro montras ke la projekto estis utila, kaj tio ne nur al la invititoj, sed ankaŭ al la japanaj prizorgantoj: ĉiuj sukcesis travivi unikajn spertojn. Ni povas nur esperi ke ĝi montros ankaŭ utilon al la movadoj en la devenlandoj de la invititoj.

Heidi Goes

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Am'... ..uziĝu. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2010. 35p. 21cm. Kolekto de 250 anekdotoj, kiuj klopodas esti amuzaj. € 4,50

Cours de langue internationale espéranto par le Saint Coran. Renato Corsetti, Franciska Toubale. Palestrina: Islama E-Asocio por Interkultura Dialogo, 2010. 73p. 30cm. Kurso por progresantoj, baze de ĉapitroj el la Sankta Korano. € 9,00

English-Esperanto-English Dictionary. John C. Wells. New York: Mondial, 2010. XLV + 459p. 23cm. Bind. Kromkovrilo. ISBN 9781595691507. "Konciza" dudirekta vortaro, kun entute pli ol 30 000 kapvortoj. € 42,00

Esperanto Mini-Cwrs. El la angla trad. P.H. Barron. Barlaston: EAB, 2010. 36p. 15cm. ISBN

9780902756304. 10-leciona kurseto en la kimra, bazita sur la populara *Esperanto for beginners* de Montagu Butler. € 2,10

Fabelo pri la triopo. Arkadij kaj Boris Strugackij. El la rusa trad. M. Bronštejn. Moskvo: Impeto, 2010. 189p. 20cm. ISBN 9785716102095. La plej satira, plej moka kaj plej ofenda romano de la fratoj Strugackij, kontraŭ la sovetia ŝtata sistemo. € 15,90

Korvo, La / The Raven. Edgar Allan Poe. El la angla trad. J. Willarson. Luck: Volinjanin, 2009. 28p. 21cm. Du-lingva (angla, E). ISBN 9789661599092. Reeldono de la unua traduko de, eble, la plej fama poemo de la usona poeto. € 3,30

Lumo kaj ombro / Svjetlo i sjena. Ivan Golub. Antaŭparolo de Vlado Košić. El la kroata trad. M. Belošević, L. Borčić,

Z. Heide. Zagreb: Kroata Esperantista Unuiĝo, 2009. 447p. 20cm. Du-lingva (kroata, E). ISBN 9789536118212. Poemoj kaj prozaĵetoj kun forta religia bazo. € 24,90

Nokta gardisto / Nije sve što oči vide. Šimun Šito Ćorić. Antaŭparolo de Vesna Kukavica. El la kroata trad. L. Borčić, Z. Heide. Zagreb: Kroata Esperantista Unuiĝo, 2008. 243p. 20cm. Du-lingva (kroata, E). ISBN 9789536118175. Elektitaj tekstoj verkitaj en la periodo 1977-2007. € 15,00

Poemaro de burglandaj kroatoj / Pjesništvo gradišćanskih hrvata. Div. Antaŭparolo de Đuro Vidmarović. El la kroata trad. L. Borčić, I. Borovečki, N. Rašić, F. Šlabek, E. Lapenna. Zagreb: Kroata Esperantista Unuiĝo, 2006. 224p. 20cm. Du-lingva (kroata, E). ISBN 9789536118106. Poemoj de kroatoj vivantaj en la aŭstria Burgenlando. € 15,00

Poezio de molizaj kroatoj / Pjesništvo moliških hrvata. Div. Antaŭparolo de Đuro Vidmarović. El



la kroata trad. L. Borčić, Z. Heide. Zagreb: Kroata Esperantista Unuiĝo, 2007. 102p. 20cm. Du-lingva (kroata, E). ISBN 9789536118144. Poemoj de kroatoj vivantaj en la itala regiono Molizo. € 9,00

Poezio kaj prozo de la rumanaj kroatoj / Pjesme i proza rumunskih hrvata. Div. Antaŭparolo de Đuro Vidmarović. El la kroata trad. C. Mocanu, M. Belošević. Zagreb: Kroata Esperantista Unuiĝo, 2008. 89p. 20cm. Du-lingva (kroata, E). ISBN 9789536118199. Poemoj kaj prozaĵetoj de kroataj vivantaj en la rumania Banato. € 9,00

Portreto de la diktatoro / A diktátor arcképe. Éva Tófalvy. Budapest: Akvila & Priscilla, 2007. 65p. 21cm. Du-lingva (E, hungara). ISBN 9632171748. Parabolo pri la politika potenco en "malfacilaj tempoj". € 6,00

Via Zamenhof. Creatore dell'esperanto. Roman Dobrzyński. El Esperanto trad. M. Lipari kaj F. Franceschi. Firenze: Giuntina, 2009. 280p. 21cm. ISBN 9788880573500. Itallingva versio de *La Zamenhof-strato*. € 13,50

Wien-Aufenthalte von Lazar Marković Zamenhof (1859-1917), Die. Und seine



ophthalmologischen Studien bei Ernst Fuchs (1851-1930). Reinhard Hauptenthal. Bad Bellingen: Iltis, 2009. 48p. 21cm. ISBN 3932807794. Germanlingva kontribuajo al la Zamenhof-jaro, pri liaj restaĵoj en Vieno kaj liaj studoj ĉe la aŭstria

profesoro Ernst Fuchs. € 7,50

William Auld – Master Poet of Esperanto. Girvan McKay. El Esperanto trad. G. McKay. Tullamore: Polyglot Publishers, 2009. 259p. 24cm. Bind. Versioj en la angla, malalteja

skota kaj skotgaela de (fragmentoj de) *La infana raso*. € 27,00

DISKOJ

Afrika kompilo.

Konga Espero, Vigla Muziko, Mayoma, JoMo. Donneville: Vinilkosmo, 2010. 74min. Kun

tekstobroŝuro. Afrika aktuala muziko el Dem. Resp. Kongo. KD. € 19,50

Samideano. Eterne Rima (Igor Wasilewski). Donneville: Vinilkosmo, 2010. 64min. Kun tekstobroŝuro. 18 pecoj hiphopaj kaj R&B-stilaj. KD. € 17,10

La naŭa



Ne de Betoveno, sed de nia Akademio: la naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. Longe ĝi restis nur mencio, kvankam Heroldo de Esperanto ja publikigis la tedan liston sen la difinoj, kaj Ondo de Esperanto faris el ĝi felietonon. Kaj la bona Akademio permesas spili ĝian retpaĝaron por mem elŝuti la trezoron.

Tamen la materialo ankaŭ por la ceteraj el ni restas koninda, certe por la instruantoj. Ofte oni supozas ke ĉiuj jam posedas la iom koston *Plenan Ilustritan Vortaron*, sed supozeble multaj el la plej uzataj, almenaŭ trastudataj vortaroj baziĝis sur ĝia respektinda antaŭulo *Plena Vortaro* (el 1933 kun *Suplemento* el 1953). Kiom el la nova listo de 209 radikoj (vortoj ofte kun "kunmetaĵoj") estas jam konataj, sed nun unuafoje deklaritaj oficialaj? Fakte unu el po kvin estas zamenhofa radiko kaj nur 25, interalie tri lando/popolonomoj (el kiuj neniun entenas PV), aperis unuafoje en PIV. Sed ja la difinoj grave evoluis. Malofte ili identas kun tiuj en PIV, preskaŭ ne kun la PV-aj. Tamen esencaj la diferencoj ne ĉiam estas: kombino aŭ malkombino de signifoj ofte rezultas la diferencon.

Sed unue ni laŭdu la Akademion pro ĉi tiu laborego: ĉefe ke ĝiaj membroj ĝenerale konsciiis ke Esperanto estas celita por la tuta mondo, do ne tre helpas tradukoj en kvin eŭropaj lingvoj, eĉ se "grandaj".

La difinoj nun ricevis precizigon, aktualigon kaj detaladon. Nur la literpriskriboj (ikso, ipsilono kaj kuo – anst. ku [kaj kvo por la latina qu]) lakone trivortas. Ĉe "ĉasio", subparto de veturilo kun aksoj kaj radoj laŭ PV, okazis amputo de la signifo kaj ankaŭ la "karoserio" povis senbalastiĝi je stirilo kaj savzono (laŭ la PIV-a ilustraĵo). Aperis novaj fakoj: ekologio, komputado, seksaj vortoj (kvankam ankoraŭ ne ĉiulande senriskaj).

Maloftas ŝanĝo de la radika karaktero: (ant)arkta, zamenhofaj, fariĝis Antarkto kaj Arkto. "Bito" (ŝipŝtipo) ricevis homonimon kun noto (la proponata "ŝanono" ne aperas en PIV). Konata ŝanĝo estas ke radaro (en PV sub "rado") jam en PIV aperas kiel radoaro por lasi al la moderna internaciaĵo radaro unusencecon. Evito de homonimeco klarigas ankaŭ ke en PIV jam malaperis "rodulo" pro la "rodo de boatoj", do muso estas "ronĝulo": la naŭa oficialigas "ronĝi", t.e. la vorton!

Pinte gravas memori, ke la insulinproduktado okazas en la pankreaTo (for la s!).

La edukemon de SAT ekzemplas la PV-a komento ĉe "aperitivo": "... kiuj laŭdire ekscitas la apetiton", samkiel la skeptika noto ĉe "prestigo": "Imponeco pro ŝajno de beleco aŭ gloro". (Vidu, kiom De Beaufront ĝuste nun influas!).

Jen la 25 ne-PV-aj vortoj (por konscii la evoluon) kaj diferencoj kun PIV

Geografiaj: brito/Britujo, japano/Japanujo, Usono.

Algoritmo: La naŭa kombinas la du signifojn el PIV.

Demografio: ne "esploro" sed scienco kaj informoj (pri loĝantato).

Diskriminacii: en PIV nur substantive.

Ekologio: en PIV ekologo estas sciencisto pri ekologio, scienco pri rilatoj; la naŭa aldonas "influoj" (el/al la medio).

Etno: ni nun vidas la diferencon disde "gento", kies anoj kredas al komuna deveno.

Eŭro: PIV klerigas nin pri la komenco en 1999 inter 12 ŝtatoj.

Festivalo: ne plu strikte perioda, i.a. pri "kino" anst. filmo.

Frustr: la "tendenco", kies mankon oni suferigas, fariĝis "deziro": senigi je kontentigo de bezono aŭ deziro.

Karoserio: vd supre.

Kasedo: sen aludo al "kaseto", kiun ankaŭ PIV ne preferas.

Kibuco: identaj klarigoj.

Klono: PIV eliras de la verbo kloni. La korekto preventas interpreti "klono" kiel (la agon) "klonado".

Komputi kaj *~ilo*: PIV krommencias la arkaigintajn signifojn "mezuri/~ilo".

Lasero: PIV klerigas nin pri la deveno de la akronimo.

Modemo: en PIV nur unuvoja eksplico de la konverto el analoga linea informo al sono (ĉe ricevo).

Pico: "italdevena" manĝaĵo, sed PIV ja mencias Napolan specon.

Skani: evidente oni ne oficialigis la duan signifon en PIV pri radioricevilo.

Transistoro: same pri la signifo "radioaparato" kun ~oj.

Tukano: en PIV mankis la kolorriĉaj plumoj.

Versio: ne oficialiĝis la tria signifo: turniĝo de naskiĝanto.

Vodko: rolas la fluo de ekonomiaj fortoj; restas Rusio kaj Pollando, sed Ukrainion kaj Finnlandon anstataŭas Svedio. PIV resendas al "viskio", sed tiu oficialiĝis nur en 1919: pri zamenhofeco mankas spuro. La unua teatraĵo ja estis *Unua brandfaristo*. (1896: L. Tolstoj, tr. V.A. Burenkov).

Poste ni eble dividus la 209 laŭ semantikaj rubrikoj. Sed nun: bonan digeston!

Rob Moerbeek

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Usono: W. Harris.

SOCIETO ZAMENHOF:

Finnlando: H. Tuomola. Germanio: E. Blasius, W. Bormann, H. Klünder, H. Muhsal, A. Putze, M. Scherm, C. Trésorier. Italio: M.T. Malatesta. Svedio: R. Lindblom.

PATRONOJ DE TEJO:

Britio: M. H. McClelland. Finnlando: O. Korkala. Usono: S. Cobb.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de aprilo 2010:

Kapitalo Afriko: Italio: M.T. Malatesta 370,00. *Sumo ĉi-jara: 370,00.*

Konto Afriko: Nederlando: C. & R. Bossong 25,00. *Sumo ĉi-jara: 536,29.*

Fondaĵo Ameriko: Svedio: J. Hammarberg 20,58. *Sumo ĉi-jara: 874,54.*

Fondaĵo Azio: Japanio: M. Aihara, T. Kaba, H. Yamaguti – po 16,08. *Sumo ĉi-jara: 676,00.*

Fondaĵo Canuto: Francio: V. Courouble 10,00; M. Leibman 21,00. Germanio: A. Engroff 10,00. *Sumo ĉi-jara: 1 031,98.*

Konto Espero (Haitio): Belgio: H. Deceuninck 28,50; G. Ricci 500,00.

Ĉinio: Y. Meng 54,00. Finnlando: P. Välimäki 28,57. Japanio: H. Egawa, M. Moriyama – po 24,12; U. Kobayasi 80,39; K. Murata 40,19; E-Grupo de Sanyo-gakuen Universitato 313,49. Kanado: B. Crisp 100,00. *Sumo ĉi-jara: 3 605,96.*

Fondaĵo junularo: Italio: M.T. Malatesta 60,00. *Sumo ĉi-jara: 60,00.*

Ĝenerala kaso: Nederlando: R. Richardson 6,73. Germanio: G. Grupp 20,00. Usono: P. Cook 171,85. *Sumo ĉi-jara: 446,32.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Rento je fiksdaj deponoj 1,75%

Pro la evoluo en la monmerkato UEA malaltigos la renton je la ŝpardeponoj de la membroj el 2,0% al 1,75% ekde la 1-a de junio 2010.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

Ni savu la dronantan ŝipon

Post preskaŭ kvarjara lamado Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio, DKEA, havas nun novan komitaton.

La nova komitato havas la defion reorganizi kaj revivigi la E-movadon en Demokratia Respubliko Kongo. En sia unua kunsido en la provizora sidejo ĉe YASA-avenuo n-ro 70, komuno de Bumbu en Kinŝaso, ĝi donis al si la taskon enlistigi la klubojn kaj la unuopulojn kiuj konsistigas la korpon de DKEA. La komitato konsistas el s-roj J.P. Lungikisa Sumbu (prezidanto), Victor Lufimpu Lukolama: (vicprezidanto), Nlandu Luyala (vicprezidanto), Arlain Kizeyidioko Mayinda (ĝenerala sekretario), Evariste Munuku Wa Mulongo (kultura konsilanto), Martin Lofemba (administra konsilanto) kaj f-ino Nelly Masemi (kasistino).

La plej granda prioritato estas havigi al DKEA legitimajn dokumentojn, la juran agnoskon kaj renovigitan statuton, por ke DKEA estu oficiale agnoskita de la konga registaro pere de la ministerio pri justeco.

La nova komitato petas subtenon por renovigo de la E-movado en R.D. Kongo. Ĝi estas malferma al konsiloj kaj kunlaboro, kaj petas bonkorajn samideanojn helpi savi la preskaŭ dronantan ŝipon. Kontaktoj: dkeaprezidanto2010@gmail.com; dkeakomitato2010@gmail.com. Tel.: 00243899945007-00243998226913-0024381717919. Adreso: DKEA, B.P. 1007, Kinshasa/Limete, R.D. Kongo.

Arlain Kizeyidioko



Tri intervjuoj kaj dulingva koncerto en Taĝikio



En la tutlanda soci-politika kaj soci-kultura revuo *Toĝikiston* (organo de la Ministerio pri kulturo de Taĝikio, n-ro 1-2) aperis granda intervjuo kun la prezidanto de la Asocio de esperantistoj de Taĝikio s-ro Firdaŭs Ŝukurov.

Servo, povos multe profiti kaj pli profunde ekkoni la morojn, kutimojn kaj kulturojn de aliaj nacioj.

En la Nacia Konservatorio de Taĝikio okazis koncerto dediĉita al datreveno de la konata taĝikia kantisto (baritonulo) prof. Ahmad Bobokulov. La koncerton organizis lia disĉiplo prof. Hajrullo Latipov. Inter la kantoj de la koncerto oni povis aŭskulti ankaŭ la faman "Respubliko mia" de la komponisto Ŝarof Sajfitdinov, en la prezento de s-ino Salima Muhabatova (sopranulino) en du lingvoj: taĝike kaj Esperante. La versojn de B. Rahimzoda kaj M. Farhat esperantigis F. Ŝukurov.

Ruŝno Rajhoni

La demandojn starigis la ĵurnalistino Sadbarg Ĝamoliddin. Ŝukurov detale respondis kaj el la respondoj la legantoj povis ekkoni la historion de la internacia lingvo kaj informojn pri Esperanto kaj la Esperanto-movado.

La 22-an de marto la 1-a tutlanda televida kanalo en sia programo "Pajvand" (Kontakto) montris intervjuon kun la vicprezidanto de AET s-ro Saidnabi Saidilhomzoda. La programero daŭris duonhoron.

La 30-an de marto la tutlanda vaste konata radio "Toĝikiston" aŭdigis intervjuon kun s-ro Saidnabi, kiu informis pri Esperanto kaj ĝia pozicio en la mondo. Ĉar gejunuloj inklinas al lernado de la angla kaj araba lingvoj, estis akcentita ankaŭ la propedeŭtika rolo de Esperanto. Estis menciite, ke vojaĝemuloj, uzante la reton de Pasporta



Membroj de la Asocio de esperantistoj de Taĝikio.

Postnikov kaj Zamenhof en Bosnio kaj Hercegovino

La unua prezento de la teatraĵo *Dek tagoj de kapitano Postnikov*, laŭ la romano de Mikaelo Bronŝtejn kaj reĝisorita de Milić Jovanović, okazis la 23-an de marto 2010 en la urba teatro "Jazavac" (Melo) en Banja Luka.



La teatraĵo estis en Esperanto kaj ĉeestantoj kiuj ne komprenis, povis legi la tradukon en la serba sur ekrano. La ĉirkaŭ 200 spektantoj kelkfoje aplaŭdis. Poste en la teatra halo okazis solena koktelo, kaj la spektantoj kun la aktoroj babilis kaj faris fotojn.

Bosniaj ĵurnaloj abunde raportis pri la evento. La prezidanto de la urba komunumo Slobodan Gavranović estis la alta protektanto. Li akceptis la aktorojn kaj la organizantojn el la Centro "BeL@Espero". Temas pri moderna teatraĵo el Kragujevac (Serbio) kaj la centro el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), kiu estas unika teatraĵo, ĉar en ĝiaj naskiĝo, preparo

kaj prezentado partoprenis homoj el kelkaj landoj (Serbio, Rusio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Ĉeĥio).

Kapitano Postnikov, artileria oficiro de la rusa reĝa armeo vivis en tempo antaŭ la Oktobra Revolucio. Li suferis pro siaj progresemaĵoj, ĉar li deziris ke ĉiuj popoloj en la mondo interparolu per unu internacia lingvo, Esperanto – klarigis al ĵurnalistoj post la prezentado de la teatraĵo la ĉefa aktoro Saša Pilipović el Serbio. En la teatraĵo ludas ankaŭ Mićo Vrhovac el Banja Luka kaj Ljubica Gašparović el Kragujevac.

Sian unuan prezentadon la teatraĵo havis en la 94-a UK en Bjelostoko. Ĉi-jare la teatraĵo estos prezentita en Sankta Peterburgo, en la 26-a Ruslanda Esperantista Kongreso, kaj en Velika Gorica dum la kongreso de Kroatia Esperanto-Ligo.

Miće Vrhovac

Esperanto bonvena

Malofte granda entrepreno aŭ asocio efektive apogas Esperanton. Agrablaj esceptoj tamen ekzistas, kaj tiam la disvastigado de Esperanto ricevas apogon, simpation kaj favoron. Tiel okazis ĉe la "Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj" (45 mil asocioj) de la urbo Volta Redonda (Rio-de-Ĵaneiro) en Brazilo, kie jam 11 jarojn funkcias senpagaj Esperanto-kursoj.



Gekursanoj en 2009, kun sia instruisto (la 5-a de maldekstre, staranta).

La kursoj daŭras 7 monatojn, kun ĉiusemajna leciono, merkrede de la 8.30 ĝis la 10-a horo kaj paŭzo je la 09.15, por kafo kun biskvito.



La asocio, en sia bela, granda kaj luksa fako "Instituto por zorgo pri la sano de maljunuloj" (sur la apuda bildo) vere favoras la instruadon de Esperanto kaj disponigas al la Esperanto-kurso vastan lernoĉambron kun moderna ekipaĵo. Pri la lanĉata Esperanto-kurso la asocio ĉiam informas la publikon per radio, televido, afiŝoj kaj la propra monata ĵurnalo *Informativo*.

La kurson la asocio konsideras utila okupa terapio kaj por maljunuloj kaj por junuloj. Fine de la kurso la lernantoj ricevas de la asocio ateston pri la partopreno.

La kurson gvidas 87-jara emerita universitata profesoro, inĝeniero Alberto Flores, BEL- kaj UEA-delegito en Volta Redonda apud Rio-de-Ĵaneiro.

Nova, jam la 12-a Esperanto-kurso, komenciĝis la 29-an de aprilo 2010.

Alberto Flores

Printempa renkontiĝo

La 20-an kaj la 21-an de marto 2010 okazis en la turista domo "Baĉo Kiro" en Drjanovo, Bulgario, printempa esperantista renkontiĝo. Ĉeestis okdek da esperantistoj el 11 urboj.

La renkontiĝon organizis kaj bonajn kondiĉojn por la laboro kaj ripozo aranĝis la prezidantoj de la E-klubo en Ruse kaj Polski Trambeŝ s-ino Margarita Savova kaj s-ro Stojan Donĉev.

Okazis interesa ekskurso al la famaj monaĥejo en Drjanovo kaj la groto "Baĉo Kiro", kaj al la apuda belega kaskado de akvofaloj. La vespero pasis en varma, sincera kaj amika atmosfero, kun dancoj, kantoj, bonhumoro kaj printempa poezio.

Dum la renkontiĝo oni diskutis pri la aliĝo de Bulgara Esperanto-Asocio al Eŭropa Esperanto-Unio kaj pri la problemoj kaj la malĝojiga stato en la nuna BEA.



La partoprenantoj decidis, ke la sukcesa Printempa renkontiĝo en Drjanovo fariĝu ĉiujara tradicia Esperanto-renkontiĝo, kaj proponos ĝin por kalendaroj de Esperantaj aranĝoj.

Milĉo Beloreŝki

Wolfgang Bienen (1927-2010) forpasis la 24-an de februaro en Aachen (Germanio). Li prezidis la lokan klubon kaj fervore aktivis en la unika trilanda societo "Senlime" kun membroj el Belgio, Germanio kaj Nederlando. Li ankaŭ motoris la Trilandan Kongreson en Aachen en 1970. Li ofte gastigis ĉinajn e-istojn kaj mem unufoje vizitis ilian landon.

Camiel De Cock (1932-2009), dumviva membro de UEA kaj iama fakdelegito pri naturismo, mortis en Halle (Belgio).


Maksis Miervaldis Ĉulitis (1911-2009) mortis en Richmond Hill (Ontario, Kanado) la 29-an de aprilo pasintjare. Li naskiĝis en Latvio, sed en 1952 li elmigris al Kanado. Li estis unu el la aŭtoroj de la grava antologio *Naŭ poetoj* (1938; reeld. 1989).

Luna Davidova (1926-2010) forpasis la 7-an de februaro en Sofio. Profesie aktorino, ŝi lernis E-on en 1984 kaj fariĝis tre aktiva en la Bulgara E-Teatro, kun kiu ŝi prezentiĝis en kelkaj UK-oj.

László Farkas (1957-2009) mortis en Eger (Hungario), kie li estis vicdelegito kaj fakdelegito pri naturkuracado.

Higinio García (1939-2010) forpasis la 8-an de aprilo en Alma (Kebekio, Kanado). Li publikigis prozaĵojn en revuoj kaj antologio kaj en 1999 la rakontaron *Kapturnoj*.

Joyce Hill (1921-2010) forpasis la 13-an de marto en Wellington (Nov-Zelando), kie ŝi longe estis vicdelegito kaj fakdelegito pri virinaj aferoj.



Ferenc Jáki (1919-2010), emerita mezlerneja instruisto kaj doktoro pri klasika filologio, forpasis la 26-an de marto en Budapeŝto. Esperanton li lernis en kurso de Julio Baghy en 1961. En 1965 li diplomiĝis kiel E-instruisto. Kun prof. István Szerdahelyi li iniciatis la leĝigon de la elekto de Esperanto kiel studobjekto en hungaraj lernejoj kaj la starigon de Ŝtata Ekzamenkomisiono, en kiu li membris de 1967 ĝis 2008, funkciante longe kiel ĝia prezidanto. De 1966 ĝis 1969 li kunlaboris kiel tradukanto kaj voĉleganto por la E-elsendoj de Hungara Radio. Dum pluraj mandatperiodoj li estis komitatano kaj estrarano de Hungaria E-Asocio, kies honora membro li fariĝis. En 1992 d-ro Jáki estis elektita Honora Membro de UEA. En 1999 li estis distingita kiel Kavaliro de la Hungara Kulturo. Li aperigis plurajn poemarojn en la hungara lingvo kaj ankaŭ skulptis, pentris kaj fotis.

Ino Kolbe (1914-2010) mortis la 16-an de februaro en Leipzig (Germanio). Ŝi estis denaska e-istino, filino de la fondinto de Germana Laborista E-Asocio Reinhold Voigt. Profesie korektisto, ŝi ellaboris multajn indeksojn, i.a. de la GDR-a revuo *Der*

Esperantist (2vol.; 1997-1998). Ŝi verkis historion de GLEA en Leipzig, *Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig* (2vol.; 1991), kaj siajn rememorojn *Mia vivo kun kaj por Esperanto* (2003; germane 2001, 2002).



Mauro La Torre (1946-2010) forpasis la 25-an de marto en Romo. Doktoro pri matematika lingvistiko, li estis profesoro pri eksperimenta pedagogio kaj komputika didaktiko en la Tria Roma Universitato, kie li ankaŭ kunordigis laboratorion pri aŭtomata tekstanalizo. Li lernis Esperanton en 1962. Li estis prezidanto de ILEI 1998-2003, kiun li reprezentis ankaŭ ĉe UEA kiel Komitatano A 2001-2004. Li membris en AIS kaj ekde 2007 en la Akademio de Esperanto. Ekde 1998 li gvidis la komunan edukprojekton de ILEI kaj UEA "Interkulturo", kies reta kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj" kunigis centon da klasoj en trideko da landoj. Pro tiu projekto la ĵurio de *La Ondo de Esperanto* donis al li la titolon "Esperantisto de la Jaro" en 2000. Kun R. Corsetti li aŭtoris la popularan lernolibron *Ĉu vi parolas tendare?* (1969; 4-a eld. 1992) kaj kun R. Corsetti kaj N. Vessella la itallingvan

lernolibron *Lingua esperanto; Corso di base* (1984). Mauro La Torre prelegis en multaj UK-oj, laste en la IKU de la 94-a UK en Bjalistoko.

Herman F. Menges (1927-2010), dumviva membro de UEA, forpasis en Haarlem (Nederlando) la 14-an de februaro. Profesia grafikisto, li kreis glumarkojn kaj grafikajojn por multaj renkontiĝoj k.a. bezonoj.

Klára Mikola (1963-2010) mortis la 7-an de februaro en Budapeŝto. En la Belartaj Konkursoj de UEA en 1990 ŝi gajnis la Premion An-okin pri Kanto per *Almozul'*, vortigita de ŝi kaj komponita de L. Garamvölgyi, kun kiu ŝi ankaŭ aperigis la kasedon *Harmoni'* (1992). Ekde 2008 ŝi estis estrarano de Hungaria E-Asocio.

Andreo Roos (1916-2010), dumviva membro de UEA, forpasis en Norrköping (Svedio) la 10-an de februaro. Li lernis E-on junaĝe kaj utilis ĝin i.a. en laborbrigadoj en Jugoslavio kaj Bulgario kaj dum bicikladoj eĉ ĝis Grekio kaj Turkio.

John Thum (1923-2009), dumviva membro de UEA, mortis en Le Locle (Svislando).

Jan Verhoeff (1917-2010) forpasis la 20-an de februaro en Roterdamo. Li estis honora membro de la E-Societo "Merkurio".


Annie Wester-van der Veen (1918-2010) mortis la 15-an de decembro en Zaandam (Nederlando). Ŝi lernis E-on antaŭ 60 jaroj kaj estis kluba estrarano kaj aktiva E-instruistino.

(Precipe) por infanoj

Unuiĝintaj Nacioj: Venu kun mi! Nane Annan. El la angla trad. Anna Löwenstein. Porinfana prezento de nia bunta mondo kaj de la laboro de UN. Zagreb: Izvori, 2001. 34p. 21cm. Ilus. €7,80.



Paĉjo, kio estas rasismo? Tahar Ben Jelloun. El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Dialogo inter patro kaj filino pri tikla temo. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. 19cm. €6,30.




Winnie-la-Pu. A.A. Milne. El la angla trad. Ivy Kellermann Reed, Ralph A. Lewin. Klasika infanlibro kun bazaj informoj, en la angla, pri Esperanto kaj ĝia movado. Rotterdam: UEA, 1992 (2a eld.). 9+164p. 19cm. Ilus. Bind. €12,30.




Liberigo / Eine Befreiung. Karl May. El la germana trad. Cornelia Rau. La plej legata germana verkisto unuafoje en Esperanto. Dulingva eldono (germana, Esperanta). Bamberg: Karl-May-Verlag, 1999. 237p. 19cm. Bind. €15,00.

La kamaradaro de Petro Nodeto. Mato Lovrak. El la kroata trad. Josip Pleadin. Romano pri infanoj, kiuj decidas ripari vilaĝan muelejon. Zagreb: KEL, 1998. 125p. 21cm. Ilus. Bind. €7,50.



Anne Frank ne estas de hieraŭ. Mies Bouhuys. El la nederlanda trad. Nora Bartels. Rakonto pri la juda knabino, kies taglibro fariĝis fama atestaĵo kontraŭ la naziismo. Apeldoorn: FELUA-grupo, 1988. 194p. 21cm. €3,90.



Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo. Tibor Sekelj. Aventuroj inter la indianaj triboj en Brazilo. Rotterdam: UEA, 1994 (2a eld.). 94p. 21cm. Ilus. €4,80.



Historioj... Rakontu! Herman Nyeck Liport, Chamberline Nguéack Zedong. Ĉarme ilustrita kolekto de rakontoj, taŭgaj por ĉiuj aĝoj kaj ĉiuj lingvoniveleoj. Douala: AfrikNatura-Esperanto, 2006. 123p. 20cm. €18,00.

Ĉe la Libroservo de UEA, triona rabato ekde tri ekzempleroj de la sama titolo.

**CRI****中国国际广播电台世界语部
Esperanto-redakcio de ĈRI**

Ĉiun tagon ĈRI parolas
Esperantalingve pri ĉio
En la mondo kaj en Ĉinio
Kaj kiel amikponto rolas.



Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040
Tel: +8610 68891940
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn

向世界介绍中国，向中国介绍世界，向世界报道世界
Ni konigas Ĉinion al la mondo kaj la mondon al Ĉinio, kaj raportas pri la mondo al la mondo.

Ni ĉiam pene laboras, ekzemple, antaŭ la mikrofono, por konigi Ĉinion al la tutmondaj samideanoj kaj alilandan E-movadon al ĉinaj verduloj. Ĉie troviĝas niaj raportistoj, ĝuste por la menciita laborado. Kune kun niaj aŭskultantoj, ni sukcese faras ĉion kaj gaje pasigas la neforgeseblajn tagojn.

Ni ĉiam pene laboras

Antaŭ la mikrofono



Ĉie troviĝas niaj raportistoj



Kune kun niaj aŭskultantoj

